

*Arta Kulturo
Kaj Turismo*



HISPANUJO

A. T. D.

ARPD

Propagando de la Reĝa Delegito pri Turismo

HISPANUJO

(DISPUBLIKIGO KAJ PROPAGANDO)

796.5(46)

*Eldonaĵo de la Reĝa Delegito por Turismo
kaj Artkulturo*

F. J. SÁNCHEZ CANTÓN

(TRADUKIS HISPANA ESPERANTO-ASOCIO)

HISPANUJO

(DISPUBLIKIGO KAJ PROPAGANDO)



MADRIDO

1926

AL LA LEGANTO

Se komprenajo povus resumigi la estintecon kaj estantecon de nacio, tiu pri Hispanujo estus la *diverseco*. Vojaĝamanto Ford nomis Hispanujon: «la lando de neantaŭvidebleco», sed tiu ĉi prijuĝo jam ne taŭgas por multaj elmontradoj de la hispana vivado.

La diverseco—historia kaj nuntempa noto pri Hispanujo—elvekas akutajn ekdezirojn ĉe la moderna homo, kiu supersata je la specialeco altrudita de la nuna vivado, volas sin elsavi el la ĉiutaga unutoneco, ĝuante mallonge kaj rapide la plej diversajn sentaĵojn. La plej malsamajn eble povas liveri Hispanujo, inter ĉiuj landoj, kaj tion ĉi plene pruvos nur rapida rigardo en ĝian geografion kaj historion, en ĝian arton kaj vivadon.

En tiuj ĉi paĝoj oni grupigas priekzemplojn, ne pretendante elĉerpi la nekalkuleblajn hispanajn facetojn. Oni povas kredeble anstataŭi multajn el ili

kaj tuj ilin plimultigi; tamen tiuj notitaj estas sufiĉe nombraj por elmontri la plej tipajn karakterizaĵojn de la hispana tutkunmeto.

Pli ol himno al Hispanujo, aŭ prilaŭdo laŭ malnova maniero, tio, kion oni tuj legos, estas tabelo de privataj apartaĵoj per kiu oni serĉas la kontraston, el kiu fluadas la ĝuo.

PRI GEOGRAFIO

Hispanujo estas lokita ĉe la okcidenta ekstremaĵo de Eŭropo; ĝi estas la fino de la mondo, la antikva kaj mezepoka *finis-terrae*. Ĝi estas preskaŭinsulo, kiu similas al dissternita bovohaŭto: kvazaŭ la klasika mito pri la forrabo de Eŭropo estus sur ĝin formenaskita, anoncanta ĉu por bono aŭ malbono, ke Hispanujo ne estas Eŭropo.

La maro, kiu preskaŭtute ĝin ĉirkaŭas kaj apartigas, malfermas al ĝi sennombrajn vojojn por esti almlilita. En la unuaj tempoj Hispanujo estis la fermo de la Mondo; de post la Renesanco ĝi estas la antaŭposteno sur la vojo al Ameriko kaj ĉiam la trapasejo inter Nordo kaj Sudo, kaj loko de ĝia porbataloj.

La iberia preskaŭinsulo—ĉar estus absurdaĵo formeti Portugalujon se oni parolas arte, geografie kaj historie—etendiĝas 584.192 kvadratajn kilometrojn, el kiuj 261.400 estas malsekklimataj; el tio sekvas neatenditaj ŝanĝoj en kreskajaro ĉe malvasta terporcio; en la sama lando troviĝas urboj, kie pluvas oftege, kiel Santiago, Oviedo, Bilbao, San Sebastián, unuvorte la tutaj norda kaj nordokcidenta regionoj, kaj lokoj, kie la pluvo ne okazas dum kel-

kaj jaroj, ekzemple ĉe la suba Aragono kaj sudo-
rienta landparto.

Inter la norda arbarlando—kverkoj, kaŝtanujoj,
fagoj, betuloj, avelarboj, tilioj, aceroj, pinoj...—,
kaj tiu Mediteranea—glanarboj, sovaĝaj olivujoj,
karobarboj, piceoj...—; inter la senarbigita stepo
kaj la fruktoĝardenoj de Murcia kaj Valencia; inter
la fruktodonaj valoj de Granada aŭ proksimaj kam-
paroj de Plasencia, kaj la olivarbaroj de Córdoba
kaj Jaen (Ĥaen); inter la tritikkamparoj de Campos
kaj la herbejoj de Asturias; inter la palmarbaroj de
Elche kaj la cipresejoj de l' Generalife; inter la
pinarbaroj de Avila kaj Segovia kaj la oranĝarbaroj
de Valencia kaj Alicante; inter la maizplantejoj de
Galicujo kaj la vinberkamparoj de Manĉujo, Rioja
aŭ Jerez... la pejzaĝa eksteraĵo de Hispanujo ŝan-
ĝiĝas ĉe ĉiu turniro de la vojo: oni do konstata, ĉu
povas ekzisti pli granda allogo por la turisto avida
pri ŝanĝaĵoj.

En Granada estas ĉefvojo, kiu komenciĝas inter
amuzaj kampodomoj, kaj tra irante amasojn da hindo-
figuoj kaj agavoj, kondukas post kelkhora supren-
rampado en la suprojn de Veleta kaj Mulhacen—la
plej alta hispana montpinto, 3.481 metrojn—ĝi trans-
paŝas la ĉiam neĝokovritan regionon, tuŝas Alpu-
ĥarajn vilaĝojn, preskaŭ la plej altajn en Eŭropo,
kaj post mallonga tempo trafas la Motril'an marbor-
don, riĉan je sukerkanoj kaj kotonujoj, kie neniam
frostas.

Nur tri horoj sufiĉas por malsupreniri de la sen-

prospera Cebrero (Lugo), kie la domoj estas rondoformaj kvazaŭ prahistoriaj konstruaĵoj—*citancias*— kaj kie oni terkulturas nur la sekalon, en la kvazaŭ vastajn longajn fjordojn de Pontevedra, kies bordoj ĉiam estas verdaj, kie fruktodonas oranĝ—kaj citronarboj, kie la palmoj kreskas prospere kaj magnolioj vivadas senpene.

Madrido kuŝas 50 kilometrojn de montaro Guadarrama, neĝokovrita en junio, kaj je sama interspaco de Aranjuez, ĉiam floranta, kaj de la senfina Manĉujo, senarba kaj senakva, kiu kvazaŭ dezerto eĉ ĝi ne estas tute ebena.

La alta kaj frostiga montaro de Gredos, kun lageto el purega akvo, lokita je 2.000 metroj da alteco, havas ĉe siaj flankaĵoj la dezerton de Las Batuecas, kiu estas amuzĝardeno kun cipresoj kaj granatarboj.

De la suproj Placo de la Maŭro Almanzor (2.661 metrojn), Calvitero (2.401 m.) kaj Acueolito (2.418 metrojn), oni superregas per vidado grandegajn pejzaĝojn el mirinda diverseco, kie frate vivas la norda floraro de la nordeturnita montodeklivo kun kaŝtarnarboj, olivujoj, figarboj kaj vinberujoj kaj eĉ la oranĝarboj de la vera de Plasencia.

Tia ja estas Hispanujo, montaro kaj ebenaĵo, marbordo ĉu abrupta, ĉu milda, stepo kaj amuzoĝardeno, intermonto kaj kruta suprenvojo, ĉiamdaŭre verda valo kaj griza plataĵo, senarba montaro kaj nepenetrebla arbaro, riveroj, kiuj dum tri monatoj estas torentoj kaj dum naŭ ireblaj vojoj; aliaj estas

kvietefluaj kaj plaĉebordaj, kaj poste sin kruteĵetas inter malglataĵoj; fine kelkaj el ili, por sin apartigi el ĉiu normalaĵo, estas teren englutitaj kaj post malmultaj mejloj ili reaperas pli akvohavaj; la maro alterne montras sovaĝajn krutegaĵojn kaj ravajn vastajn enpenetriĝojn en la teron kvazaŭ fjordojn, kie tero kaj akvo ŝajnas amuziĝi per longa kuntuŝo, kaj kies enirejoj estas ŝirmitaj de insuloj, kiuj igas ilin sendanĝeraj kaj oportunaj.

La klaraj vortoj per kiuj Reĝo Alfonso la saĝulo priŝkribis Hispanujon en la XIII^a jarcento, venas al nia plumo; jen ili estas, ĉion resumigante pli bone ol ni povus diri:

«EL ĈIUJ LANDOJ DE LA MONDO HISPANUJO MONTRAS SUFIĜEGECON KAJ BONECON, KIUJ NE TROVIĜAS EN ALIA LOKO...

»ĜI ESTAS TUTE ĈIRKAŬFERMITA. UNUFLANKE DE LA PIRENEA MONTARO, KIU ETENDIĜAS ĜIS MARO, ALIFLANKE DE LA OCEANO, FINE DE LA TIRENA MARO...

»... KIEL DIA PARADIZO HISPANUJO ESTAS SUPERVERŜITA DE KVIN ĈEFAJ RIVEROJ, NOME: EBRO, DUERO, TAJO, GVADIANO, GVADALKIVIRO; INTER ĈIUJ DU EL ILI ESTAS GRANDAJ MONTAROJ KAJ TERPECOJ: LA VALOJ KAJ EBENAĴOJ ESTAS GRANDAJ KAJ LARĜAJ, KAJ PRO LA BONECO KAJ TAŬGECO DE LA RIVEROJ ILI DONAS MULTAJN KAJ

SUFIĈEGAJN FRUKTOJN: HISPANUJO ESTAS
PLEJ GRANDPARTE SURVERŜITA DE FONTOJ
KAJ RIVERETOJ, KAJ SE BEZONE NE MANK-
AS AL ĜI PUTOJ ĈIULOKE.

»HISPANUJO ESTAS MULTHAVA PRI GREN-
KRESKAĴOJ, RAVIGA PER FRUKTOJ, MULT-
PROVIZITA JE FIŜOJ, LIVERANTA BONAN
LAKTON KAJ EL ĜI FARITAJN AĴOJN, PLENA
JE CERVOJ KAJ ĈASAĴOJ, KOVRITA DE BRU-
TAROJ, PROSPERA PRI ĈEVALOJ, PROFITA
PER MULOJ, ŜIRMITA KAJ PROTEKTITA DE
KASTELOJ, GAJA PRO BONAJ VINOJ, PLEZU-
RIGITA DE LA PANA SUFIĈEGECO, RIĈA JE
METALOJ: PLUMBO, STANO, HIDRARGO,
FERO, KUPRO, ARĜENTO, ORO, JE MULTE-
KOSTAJ ŜTONOJ, JE ĈIUSPECAJ MARMOROJ,
JE SALMINOJ KAJ ALIAJ MINAĴOJ BLUAJ
KAJ RUĜAJ, KRETO, AĴUNO, KAJ MULTAJ
ALIAJ, KIUJ ANKAŬ TROVIĜAS EN ALIAJ
LANDOJ, FORTA PRI SILKO KAJ PRI KIO
ESTAS FARITA EL MIELO KAJ SUKERO, LU-
MIGITA PER VAKSO, PROVIZITA PER OLEO
KAJ ABUNDA JE SAFRANHAVO.»

PRI HISTORIO

La historio de Hispanujo, kiel tiu de la ceteraj popoloj, kaj eble pli ol ia ajn, estas regata de la geografio. Preskaŭinsula kaj traŭra lando, kun fruktodonaj regionoj kaj aliaj subtere riĉegaj, ĝi estis kvazaŭ promesita feliĉtero por diversaj rasoj.

Ne transirante la prahistoriajn limojn, oni povas diri ke tie ĉi sidadis iberoj kaj keltoj, fenicoj kaj grekoj, kartaganoj kaj romanoj; el ĉiuj restas monumentoj, ĉiuj lasis etnajn postesignojn. Dum plenaj jarcentoj tiuj ĉi sinsekvantaj perfortaj invadoj kaj okupadoj kreadis iom post iom la fizionomian profilon de Hispanujo, ĉar neniu el la diritaj popoloj sukcesis frankvile ĝuadi la posedon de nia lando.

Ĉe la komenciĝo de la kristana epoko, kiam la unuformiga romanigo ne estis ankoraŭ sukcesinta elradikigi la primitivajn karakterizaĵojn, venis la nordbarbaroj, kiuj starigas du ĉefajn reĝolandojn: la suevan kaj la vicgotan: la unua karakterizata de iu sentemeco; la dua, kun granda kulturo, atingis helfamon, kiun superis neniu el la samspecaj reĝolandoj tiamaj.

Sed kiam la antaŭaj elementoj ne estis ankoraŭ

elapartigataj, la maŭroj subitvenis, kiuj ne nur per la milito superregis Hispanujon, sukcesante de la kultura vidpunkto dum du jarcentoj tiel, kiel neniam ilia raso trafis.

La kristana rehaviga almitado, arbitre prijuĝita kiel milita entrepreno, daŭranta okcent jarojn, estis afero tre malsama al longega militado, ĉar en ĝi partoprenis etnaj fortoj, geografiaj altrudoj, sociaj ŝanĝoj: ĝi estis io multe pli komplika ol simpla batalado de popoloj malsamreligiaj.

Kiam la unuaj jarcentoj de la Mezepoko estis ĵus pasintaj en Hispanujo, dum kiuj la kristanoj vivis ĉe plej granda senorganizo, tre firme ekmontriĝas kelkaj naciaj centraĵoj: Portugalujo, kun tersupraĵo, lingvo kaj raso komunaj kun aliaj terpecoj de la preskaŭinsulo, efikigis la sendependecon kaj eĉ la memapartigon per penado de la memvolo, kaj dum la fluado de la tempo, riskirante en la Mallumegecan Maron, sukcesis regadi ĉe malproksimegaj landoj; Leonujo, kunigita al Kastilujo, estis ne sole la geografia sed ankaŭ la ĉefviva centro de Hispanujo dum kvincent jaroj; Navarujo, ĝis la Moderna Epoko, iradis ofte laŭ la altirvojo de Francujo, kaj Aragono, se unuflanke konservis la indiĝenajn elementojn same aŭ eĉ pli ol Kastilujo, aliflanke, serĉante kun Katalunujo kaj Valenciujo la naturan ekspansion tra la Mediteraneo, okazigis multajn el niaj eliroj en Eŭropon.

La suda regiono, dividita en diversaj bandoj, estis ĉiufoge pli malforte superregata de la Maŭroj, kiuj

dividitaj laŭ regnetoj, atendis nur la kristanan militentempuŝon por malbone morti.

Sed oni ne devas kredi tiujn ĉi naciajn centraĵojn dividitajn en du bandoj: tiu de la Kruco kaj tiu de la Duonluno — en senĉesa kaj obstina batalado, ĉar paco inter maŭroj kaj kristanoj okazis tiel ofte kiel la malpaco inter reĝolandoj samreligiaj, kaj oni kalkulas okazojn, en kiuj maŭroj kaj kristanoj sin kunligis por batali ĉu kontraŭ aliaj kristanoj, ĉu kontraŭ aliaj maŭroj.

Por la historio de la civilizacio, pli ol tiujn ĉi bataladojn estas grave signomontri la du vivantaj fluojn, kiuj fruktigas nian kulturon: la Kompostelan pilgrimadon venantan el Eŭropo, ĉe la Nordo; kaj ĉe la Sudo, la kuntuŝiĝon kun la orienta kulturo. Tiuj ĉi ĉefakvoj el tiel malsamaj fontoj intermiksiĝante sur landojn loĝatajn de fortikaj rasoj, ekĝermigis kaj forte kreskigis vegetaĵaron multeforman, sendresan kaj originalan, kiu nur bezonis konstantan terkulturon por ke tute disvolviĝu la mirindaj floroj de la Arkitekturo, Skulptarto, Muziko kaj Leĝaro, kiuj faris el Mezepoka Hispanujo la Majstrinon de Okcidento, malgraŭ ke estas multaj ankoraŭ kiuj ne konas aŭ neadas ĝiajn instruojn.

La speciala karaktero de la rehaviga almitado klarigas nian Mezepokon tiel diversecan pri arto kaj beletristiko. La disdivido en reĝolandoj kaŭzis nian ankoraŭ ne sukcesintan nacian unuiĝon, kaj tiu ĉi, por multaj hispanoj dolora domo, estas por la vojaĝanto elfluejo de ĉarmo kaj ravo.

La unuigo estis la fiksideo de la Reĝino Katolika; siajn ripetatajn intencojn al tiu celo ŝi ne vidis sukcesintaj. Nur ŝi atingis unuigi kaj meti sub sian regadon Kastilujon, Leonlandon, Galicion, Asturion, Vaskajn Provincojn, Ekstremaduron, Aragonon, Katalunujon, Valencion, Murcion kaj Andaluzion; ĉi tiuj regnoj, unuigite, entreprenis kaj efektivigis la Amerikan almiliton. Tre obstine kaj interese Elizabeto I^a celis la unuigon kun Portugalujo; sed la morto rompis fojon post fojo ligilojn kapablajn kuniĝi nin kaj kiam la unuigo alvenis, ĝi estis mallongedaŭra; ĉar, de unu flanko, pro heredo de l'Reĝo *Bela*, ni vidis nin kompromitataj de aferoj eŭropaj kaj konstantaj, kiuj malpermesis al ni interkompreniĝi kun la frata popolo; de alia flanko, Portugalujo ĵus vidis dolore siajn idealojn en Afriko frakasigantaj, kaj ĉi tio akriĝis kaj vivigis ĝian emon longtempan, noblan kaj legitiman, al sendependado.

La transmaraj entreprenoj kaj la eŭropaj aventuroj elsangigis kaj malriĉigis eksterordinare Hispanujon; sed ili riĉigis ĝian spiriton kaj semis ĝin el glora pasintaro.

La politika kaj militista dekadenco koincidas kun la brilego kaj supereco de la literaturo kaj arto; la senĉesaj militaj malsukcesoj estis kaŭzo por ke niaj energioj pli malmulte disiĝu. Aventuroj dum unu jarcento estis fundamento por amuzigo kaj pripensado; vekigis aktivecoj, kiujn la senĉesa malkovrado kaj almitado restigis flanken kaj senuze, kaj

tiel, meze de miriganta belradia sunkuŝiĝo, Hispanujo travivis la XVII^{an} jarcenton.

Dum la XVIII.^a jarcento fajlas nian nacian karakteron la ripetataj provoj eŭropigantaj, kiuj, koincidente kun la entroniĝo de franca dinastio, varbas la klasojn direktantajn, progresigas, nedubable, la vivon de Hispanujo; sed kiam oni intencis reformojn, kiuj vundis kutimojn kaj sentojn popolajn, oni konstatis ke ankoraŭ restis netuŝata la esenco de la karaktero dum la milito por la sendependeco.

Pri tio, kio poste okazis, ankoraŭ ne estas okazo paroli, ĉar la ĵusa historio estas tiel maldolĉa kiel nematura frukto laŭ diris la tutmondfama romanisto Galdós.

Per la doloro de tiom da malfeliĉaĵoj, Hispanujo kreis propran civilizacion — lingvojn, literaturojn, artojn, leĝojn...—, kiujn ĝi sindoneme semis sur kontinenton.

Oni povas reprezenti la historion de Hispanujo per riĉega vazo, kiu, plena je plej bongustegaj fruktoj, estus renversiĝinta, konservante nur la aromon kiel rememoron.

LA ARTOJ

Se la tersupraĵo kaj klimato de Hispanujo vidigas karakterizaĵojn eĉ kontraŭajn; se pri temperaturoj kaj tial pri floraro kaj faŭno, la tero hispana produktas specojn el malproksimaj teritorioj; se la etnologiaj karakterizaĵoj parolas pri restsignoj de malsamaj rasoj invadintaj, kaj la historio pridiras per ĉiuj siaj paĝoj variecon, ne estas strange, ke ĉi tiuj cirkonstancoj influante la artojn, montru la plej riĉan aron el formoj pri beleco, kiujn hodiaŭ estas eble admiri en la mondo.

Sed ne tial oni devas opinii, ke la hispana arto estas simple specimenaro el malsamaj stiloj, kvankam estas tipa la diverseco de iliaj aspektoj, diverseco naskita de l'fruktodona kunparigo de influoj; male, oni devas konvinkiĝi kaj submetiĝi antaŭ la profundaj kaj ĉiam daŭraj karakterizaĵoj, kiuj donas fizionomion konstatatan de fortaj trajtoj al ĉio preskaŭinsula.

Tial ke Hispanujo estas lando de praartuloj la vojaĝanto trovos genealogion tie ĉi de aliaj multaj formoj maturiĝintaj ĉe aliaj landoj; kaj tial ke ĝi estas lando de tradicioj, li trovos skizojn kaj provojn tiajn, kiajn lasis kreintoj sen konstanteco kaj sen

sorto – ĉar malbonŝanco ofte estas la premio al tiu virto.

Ankaŭ de Okcidento povas eliri la lumo de l'arto, kiu estas lumo delikata kaj mi ĉi. Hispanujo estis fokuso elradiiganta artajn formojn dum la malproksimaj epokoj prahistoriaj; kaj dum la mezepoka mal-lumeco, ĝi estis lumiganta torĉo; kaj ĝi estis gvidilo por la moderna pentrarto; kaj dum la momentoj plej lacigaj por la eŭropa arto, ĝi povas fieriĝi esti produktinte geniajn artistojn originalajn. Sed ne ĉiam oni estis taksanta juste nian arton, kiu estis mal-multe akademia kaj tro nedisciplina kaj sen rigoreco por sia evoluado, ĉar kuraĝo kaj originaleco estas kvalitoj, kiujn iuj juĝas duaj, tial ke ili metas tiujn kvalitojn sub ordon kaj regulojn—ĉe Hispanujo ne atentataj, feliĉe, dum la epokoj plej fruktodonaĵ pri literaturo kaj arto—. Sed spite de tiuj pensantaĵ, ke mezuro estas super ĉio, oni memvole konscios, ke la vojaĝanto ĝuos intense admirante verkojn liberajn el akademiaj postuloj, laboratajn ĉe la vejno brava de la raso, de la hispana arto plena je forto kaj pasio; kiu, malpli intelekta ol homa, serĉis ĉe l'homoj el karno kaj ostoj la inspiron; de kio devenas ankaŭ la antagonismo de ĝiaj trajtoj—mistika entuziasmeo kaj ŝatata realeco—karakterizantaĵ niajn artojn kaj niajn literaturojn, ekzistantaj eĉ ĉe unu persono mem—Quevedo, Goya...—, kaj eĉ ĉe unu verko mem—*Kihoto*, *Sa Elizabeto* de Murillo...

LA ARKITEKTURO

De la infaneco de l'Homaro prezentas Hispanujo elmontraĵojn, kelkajn antaŭajn kaj aliajn superajn je tiuj de l'cetero de Eŭropo.

Torralba (Soria) estas konsiderata la plej malnova stacio prahistoria. Ne estas propre arkitekturaĵo la groto de Altamira (Santander).

Sed apartenas tutplene al arkitektura arto la megalitaj konstruaĵoj.

Eble, esceptante la grandajn piramidojn de Egiptujo, ne estas en la mondo konstruaĵoj komparindaj kun la dolmenoj de la Cueva (*Kueva*) de Menga (Málaga), Cueva de l' Romeral (ankaŭ de Málaga), Los Millares (*Miljares*, Almería) kaj Matarrubilla (Sevilla). Plej simplaj dolmenoj estas abundaj en Galicia, Salamanca, Avila kaj Kataluĝa (Katalunja). La *taulas*, *talajots* (*talajots*) kaj *navetas* de Balears estas maloftaj modeloj. La *castros* (*Kastroj*) de Galicia kaj Portugalujo, kaj la *mamoas*, iam tiel riĉaj je oraj kvazaŭ ordenaj kolringoj kiel hodiaŭ forabataj kaj ankoraŭ nestudataj, havigas arĥeologiajn tipojn interesajn.

La marmarĉoj de l' Gvadalkiviro gardas, eble, la ruinojn de la glora urbo Tartesos, kiu eble kun

Creta kaj Egiptujo estis lulilo de originala kaj miriganta civilizacio.

La remparoj de Tarragona kaj Sagunto, la digo kontraŭ la maro en Ampurias, la komerca konkurejo de Bares (Coruña-*Korunja*) estas grandiozaj titanaj restaĵoj de la praromana arkitekturo. Dank'al modernaj elfosaĵoj, kompletaj iberaj urboj eliras al la lumo; la heroa Numancia denove metas al fluo de l' vento la cindrojn de sia ofero; la homplena Arcóbriga montras sian templon, sian cirkon, sian kunvenejon, kaj ni povas trairi ĝiajn stratojn ricevante la impreson vibrantan pri la antikva vivo. Ĉe la Nordo de Portugalujo kaj Galicia, ĉiutage aperas novaj *citánias* (Briteiros, Santa Tecla, Mondariz, San Esteban de Las...), sciigante al ni pri popolo kun malmultaj vivnecesaĵoj, pri popolo vivanta trankvile kaj bone provizata.

Tra la tuta Hispanujo aperadas restaĵoj de sanktejoj; kaj se ĝis nun ankoraŭ oni ne malkovris iun kompletan, tamen oni prenas plenmane bronzaĵojn, ankaŭ ŝtonajn, feraĵojn kaj vitrajn ilojn, kiuj permesas konadi iom post iom la industriaĵojn kaj artojn kaj plastikaĵojn iberajn.

La romana regado en Hispanujo estis, kiel ĉie, eminente konstruanta; kaj tial ke ĝia arkitekturo estis solida, ankoraŭ oni povas admiri verkojn supermezurantajn tiujn de Italujo mem. En la tuta mondo ne estas konstruaĵo romana komparinda je la Akvadukto de Segovia, nek ponto pli kuraĝa kaj bela ol tiu de Alcantara, nek teatro pli bona ol tiu de

Agripa en Merida; nek restaĵoj de minekspluatado pli vasta ol tiu nomata la *Médulas de l'Bierzo*, abundaj je oro; la turo de Herkuleso en la Coruĝa, *farum brigantium*, fama je la Antikva kaj Meza Epokoj, estas impona konstruaĵo supermezuranta ĉian laŭdon; la amfiteatroj kaj cirkoj de Merida, Italica kaj Sagunto; la arkadoj de Tarragona, Evora, Medinaceli, Cáparra; la temploj de Merida kaj Talavera la Vieja; la pontoj de Salamanca, Bibey (Orense) kaj Merida; la banejoj de Alange en Badajoz (Alañe, Badajoz), kaj multenombraj ruinoj kaj ŝoseoj, proklamas la gravecon de Hispanujo ĉe la Imperio.

Pri la privata vivo de la romanaj tempoj restas mirindaj elmontraĵoj kiel la Villa (Villo) de Navatejera, en Leon; la palaco de Aŭgusto, en Tarragona, k. c., k. c.

De la komenciĝo de l'kristanismo, kiu en Hispanujo havis adeptojn de la 1^a jarcento, ankaŭ oni konservas restaĵojn, gravajn monumentojn: la bazilikojn de Manacor, de Cabeza de Griego kaj de Mérida kaj la episkopejon de ĉi tiu lasta urbo: la nekropolon de Cilla, en Huesca; la kupolojn de Centcellas; la misteraĵajn konstruaĵojn de Gabia la Grande, en Granada, kaj aliajn multajn restaĵojn konstatantajn malavarecon kaj fervoron rimarkindajn. Pravas ĉi tiu primitiva kristana arto parencecon kun tiu de la Norda Afriko, rilato kiu antaŭe kaj poste ligis kaj ligas nian vivon.

Se de la Suevoj apenaŭ restas monumentaj memoraĵoj—iu maŭzoleo kaj iu laborita ŝtono—, ne okazas same pri la tempoj de la Vicgotoj, de kiuj devenas nombraj preĝejoj: San Juan de Baños, Palencia; San Pedro de la Nave, Zamora; Santa Comba de Bande, Orense; kaj Montelios, proksime de Braga (Portugalujo).

La unua, vasta, belproporcia; la dua, riĉa je skulptaĵoj; la tria, kun proporcioj belegaj kaj rimarkindaj distingecoj, kia estas ĝia kupolo; la kvara ankaŭ kun speciala strukturo, estas la majstraj verkoj de tiu arto kuniganta la klasikan tradicion, la fiksideon de la Imperio de Oriento kaj la fundamentojn, kiujn ĉiufoje oni forgesis pli, de la vasta barbara dekoracio. Oni konservas malmultajn gotajn konstruaĵojn publikajn, kaj el ili plej grava estas la reformo de la ponto de Mérida, kiun oni faris dum regado de Ervigio. El privataj konstruaĵoj restas ruinoj de la Villa de Daragoleja, Granada, kapitejoj kaj fragmentoj dekoraciaj de la palacoj de Toledo kaj Mérida.

Ju malpli la vicgotoj lasis al Hispanujo artaĵojn—nek eĉ vortojn en niaj lingvoj, nek kutimojn, nek apenaŭ monumentojn—, la Maŭroj des pli, ĉi tiuj signis sian pasadon kaj restadon ĉe ni laŭ neforigebla maniero. Nenio pli alloganta por la turisto, nek pli alvokanta ol Córdoba, Sevilla, Toledo, Granada... kaj tiom da urboj, trezorejoj da artoj, kiun nur ĉi tie oni povas admiri. Sed ne nur la kordoba moskeo, la Giralda (Ĥiralda) kaj Alcázar (Alkazar), de

Sevilla; Santa María la Blanca, la Tránsito kaj la Laborejo de l'Maŭro, de Toledo; la Alhambra kaj la Generalife de Granada, altiras la turiston, ankaŭ lin allogas la aspekto kaj kutimoj de multaj vilaĝoj kaj urboj, kiuj estas tute maŭraj pro la arĥitekturo kaj pro la vivkutimoj; la orientaj fruktoĝardenoj, kiujn oni surverŝas per maŭraj kanaloj; la kostumoj kaj terkulturaj sistemoj, la muziko, la kortoj kaj la fenestroj kun kradoj, la ĝardenoj kaj la palmaroj... kaj la lumo blindiganta de suno fajrobrilega: la vizio de Oriento ĉe la ekstrema Okcidento.

La araba arto floras en Hispanujo same kiel ĉe la lando en kiu ĝi naskiĝis: ĝi trovis ĉe ni favoran fruktodonan grundon; la tipa arkado hufferajforma, kiu estis *ĝla arkado propria* en la Preskaŭinsulo, aperas ĉe ni kelkajn jarcentojn antaŭ la invado. El ĉiuj periodoj ni havas ĉefajn konstruaĵojn: el la progresema kaj brilega epoko de la Kalifoj, la mirindan moskeon de Córdoba (de la VIII^a jarcento al la X^a) kaj la ruinoj de tiu granda urbo, en kiu brilis la lukso kaj disvolviĝis la plezuro kaj kiun oni nomis Medina Azahra (X^a jarcento), kiu estis kaprico de ĉiom-pova Kalifo; el la tempo de la *Almohades*, la Giralda'n (XII^a jarcento), unu el plej belaj turoj de la mondo. Kaj kiam la araba civilizacio, post perdo de la energio kuraĝa, kiun naskis la povo, vivadis ĉe la mallaboremo kaj la lukso, konservante la geniecon artan sed rafinitan, kiel ĉiam okazas dum dekadencoj, oni faris tiujn revaĵojn de Granada, kiujn oni nomas Alhambra kaj Generalife (XIII^a kaj XIV^a jarcentoj).

Apud ĉi tio ni havas centarojn el kasteloj kaj pala-
coj kiel la Alcázar de Sevilla (XIV^a jarcento), kiu,
rekonstruita de la kristanoj, estas pli bone kaj
grandparte maŭrida.

Tra ĉie la araba marko aperas sur la hispanaj
artoj, super ĉio sur la industriaj: ceramikaĵoj, teksita-
taĵoj, armiloj, eburaĵoj, ledoj; ne estas elmontraĵo
pri beleco de la Mezepoko hispana al kiu mankas iu
mahometa elemento, kaj forte vidigas ĝian kuneston
la kristana, *mozárabe* kaj *mudéjar* (*mudeĥar'*) arki-
tekturoj (1).

Dum la nebuloj de la VIII^a jarcento al la X^a, kiam
en Eŭropo la kultura nivelo subiris pli—kaj nur en
Francujo la fokuso Karolinĥia donis nenion origina-
lan, ĉar ĝia celo difinita estis restarigi la roman im-
perion—du artaj stiloj belstarigas ĉe la Preskaŭinsu-
lo: la *asturia* aŭ protoromana kaj la *mozaraba*.

La Karolinĥia arto—kiu, kiel la tuta kulturo de
l'Kortego de la Imperiestro, ricevis hispanajn influ-
ojn personigatajn de nia granda Teodulfo—prezen-
tas en la Preskaŭinsulo unu el siaj plej tipaj speci-
menoj: San Pedro de las Pueblas (Barcelona).

La preĝejoj de Asturias, de la IX^a jarcento, estas
la plej klaraj antaŭaĵoj de la romana stilo en la
mondo, pro siaj elementoj kaj pro sia organizo. Estas

(1) *Mozarabe* estas kristano kunvivanta kun la
araboj; dum *mudéjar* estas arabo kunvivanta kun
kristanoj.

distinginde starigi du grupojn el tiuj preĝejoj: tiun de Alfonso II^a la Ĉasta, al kiu apartenas Santullano de los Prados, San Tirso, la Cámara Santa, kaj kiun eble oni ŝuldas al genieco de l'arkitekturisto Tioda: formo de baziliko, monolitaj kolonoj, kaj, kelkafoje, pilastroj kun kapiteloj kaj uzo de eksteraj apogiloj de la muroj por ĉi tiujn refortigi; kaj tiun de Ramiro I^a, al kiu apartenas Santa Maria de Naranco, San Miguel de Liño, Santa Cristina de Lena, Salvador de Dios..., kaj ĉe tiuj ĉi preĝejoj koincidas «kun la fortaj apogiloj eksteraj, internaj refortigiloj laŭ bizantina maniero kvazaŭ kolonoj, sur kiuj staras muraj arkadoj, kaj aliaj trae zonante la kanonajn arkaĵojn, kiuj kovras absolute ĉi tiujn konstruaĵojn... metodoj fundantaj, du jarcentojn poste, la roman-lemosinan sistemon». Definitive oni atribuas al Ramiro I^a (842-850) ĉi tiujn konstruaĵojn.

La mozaraba arto estas speciala rezultato de la viviganta agado de la araba genieco sur la vicgotan tradicion, kiu vidiĝas evidente per la belegaj preĝejoj konservataj en Celanova (Orense), Escalada kaj Peñalva (León), Lebeña (Santander), Melque (Toledo), San Baudelio (Soria), La Peña (Aragón), La Cogolla (Logroño)...

Ĉi tiuj du grupoj el monumentoj *asturia* kaj *mozaraba* estas perfekte difinitaj ĉar la plej granda parto el ili havas daton. Tre pasie iuj fremdaj kritikistoj estas neintaj ilian aŭtentikecon sin pravigante per tio ke Francujo posedas nur negravajn restaĵojn el

praromanaj preĝejoj, *Karolinĥiaj*, detruitaj de du plagoj: la tempo kaj la rekonstruantoj.

La vojaĝanto, kiu decidis fari ekskurson por ĝui ĉi tiun arton de l'malproksimaj jarcentoj de l'Kristanismo, devas konscii, ke ĉi tiu ekskurso estas unika en Eŭropo kaj eksterordinare pentrinda kaj sugestanta. Multaj el ĉi tiuj preĝejoj staras ĉe belegaj lokoj, malofte vizitataj. La vizito mirigas pro la lerteco, kiun vidigas la konstruaĵoj; iliaj malgrandaj dimensioj ne estas malfavoraj al la grandioza utiligo de la uzitaj elementoj. La mozarabaj preĝejoj elmontras unu faceton de la hispana personeco: la diversecon el tipoj, la variecon el formoj ĉe unu stilo kun propraj karakterizaĵoj. La mozaraba arto estas klara ekzemplo, ankaŭ pri la fenomeno, tiel hispana, elpruvanta kiel stilo frupereas kiam ĝi ekalvenas preskaŭ al plenperfektiĝo, al granda floriĝo, pro la invado de fremdaj formoj, je ĉi tiu okazo, la alveno de la romana arto.

Oni ne povas dubi, ke la naskon de la nova stilo ankaŭ partoprenis Hispanujo. Ĉe ni oni trovas multajn el ĝiaj elementoj pli antaŭaj je ĉiuj de la tuta mondo, kaj oni estas vidinta kiel la preĝejoj de Asturias stariĝas du jarcentojn pli antaŭe ol romanstilaj.

La «vojo al Santiago» estis efikega arterio por la kulturvivo de Hispanujo, sed ankaŭ same ĝi estis por tiu de Eŭropo; se sur ĝi venis la ĉarmaj strofoj provenzaj, sur ĝi iris la ritmoj kaj melodioj de la

Araboj fruktigi la eŭropan muzikon kaj eble ĝi estis vojo eksportanta formojn de Arkitekturo; rememoru ke Alfons IV^a dotas la konstruaĵon de Cluny, kaj ke Silos kaj San Isidoro de León ne havas francajn praaĵojn.

Dum la regado de Sancho el Mayor (1000-1038), ŝajnas ke tra Navarra eniris la romanaĵ formoj fremdaj. Oni devas atenti, ke la pilgrimado al Santiago estis la plej favora kaj deca pero por la rapida importado de la nova stilo.

Finiĝo de la fervora vojaĝo, la imponanta preĝejo de Santiago (1060-1096) estas speciala verko de la romana arkitekturo kaj samtempa de sia rivala San Sernin de Toulouse; samtempe, kiam kulminacias la periodo pri skulptarto per la Portalo de Platearias (1102), eniras triumfe la gotika arto per la Portiko de la Gloria (1188) de l'senmorta majstro Mateo. Poste starigas aliaj preĝejoj: tiu malnova de Coimbra, tiu de Orense, tiu de Tuy... Inter la grandaj preĝejoj romanaĵ de Hispanujo estas: San Isidoro de Leon (1005-1149) kun sia reĝa tombejo; Sahagún ĉefmonaĥejo en Hispanujo de la monaĥejoj de Cluny; la Katedralo de Jaca; tiuj de Zamora, Toro kaj malnova de Salamanca, altenigas siajn kupolojn kun sperta bizantina strukturo donante tiel singularan karakteron al romana stilo. En Avila, la Baziliko de San Vicente montras jam ion pri la transiro al gotika arto. Ĉi tie ni ne povas priskribi la preĝejojn de Segovia kun iliaj tipaj eksteraj galerioj (San Millan, San Martin, San Juan de los Caballeros), nek tiujn

de Soria (San Juan de Duero kaj Rabanera kun rimarkinda krucumiĝo de arkadoj), nek la aragonajn kaj katalunajn (San Pedro el Viejo de Huesca, Galeriojn de Gerona, eksteran galerion de Ripoll) kaj tiom da aliaj multenombraj.

Tipe hispanaj estas la romanaj konstruaĵoj el brikoj kaj ĉi tiujn konstruaĵojn oni povas konsideri kiel tradukon al populara arto de tiu nobla arto importita, klunja (de Cluny). Ĉar ĝi estas populara, ĝi entenas grandparte maŭran karakteron, kaj maŭridoj estis la plimulto el la majstroj kiuj kontruis la preĝejojn mudeĥarajn. Ĉi tiu arto estas gracia; la troaj severeco kaj malheleco de la romanaj preĝejoj perdiĝas uzante ne dikan, nek grandan kaj favoran al skulptarto, materialon; la ornamaĵoj, pro postuloj de la materialo nur geometriaj, rompas la severajn kaj ampleksajn liniojn kaj vivigas la tuton per la devigata alternativo de brikoj envicigitaj sur gipsaj tavoloj donanta kolorvariecon, foje, per abunda ornamaĵo el skulptita gipso (preĝejoj de Cuellar, de Arevalo, de Sahagún, k, c.)

Ĉiutage oni konstatas pli evidente, ke la romana stilo estas transira kaj ke la gotika estas la fino de ĝia evoluado. Eble partoprenis la naskon de la arkitekturaj nervaroj la krucumiĝantaj arkadoj de l' kalifa stilo, kaj tial Hispanujo rajtas havigi al si titolon pri nasko de la gotika arto.

Je la komenco, antaŭenpuŝata la gotika arto de

la reakcio de l'monahoj de l'Cister kontraŭ la lukso kaj fiereco de tiuj de Cluny, kaj sukcesinte eksterordinare la bernardaj monaĥoj, Hispanujo vidis starigi konstruaĵojn transirajn je la fino de la XII^a jarcento kaj komenco de la sekvanta; sed la preĝejoj kaj monaĥejoj de l'Cister, forkurante el la monda bruo, estis starigataj malproksime de la urboj, kaj kiam la monaĥoj forlasis ilin, ĉi tiuj ruiniĝis, kaj ruinoj estas Moruela, en Zamora, la plej antikva el la hispanaj, Retuerta kaj Balbuena, en Valladolid; Sacramenia, en Segovia; Piedra, Vuela kaj Rueda, en Aragón; Oliva kaj Fitero, en Navarra; Poblet, en Tarragona; Santa Creus, en Lérida, k. c., k. c., nur oni konservas la kulton en bernardaj monaĥejoj kiuj staras ĉe regionoj kun kampara kaj densa loĝantaro, kiel ĉe Galicia (Armenteira, Melon, Osera, Oya) kaj Portugalujo (Alcoba, kolora monumento kie kuŝas eterne Inés de Castro ĉe romantika tombo).

La grandaj gotikaj katedraloj, Burgos (1227), kaj León, neniel envias la francajn kaj germanajn, eĉ tiuj supermezuras la lastajn pri varieco kaj riĉeco, sed la hispanaj, restas sub fremdaj pri unueco. Hispana katedralo estas kvazaŭ vivanta estaĵo dum pli ol 500 jaroj; la fervoro de ĉiu jarcento aldonis al ĝi artajn belaĵojn ne imitante la antaŭajn; kaj tiamaniere niaj katedraloj alvenis al ni kiel veraj sumoj pri arto; la plej diversaj stiloj unuiĝas ĉe ili nur per la sento inspiranta la diversaĵojn kaj per la

nacia karaktero, marko pri ilia konstruado. Estas nekalkulebla la nombro da preĝejoj gotikaj de Hispanujo: de la lasta triono de l'XII^a jarcento (Katedralo de Avila kaj San Vicente de la sama urbo; Portiko de la Gloria, de Santiago; Las Huelgas, de Burgos), ĝis sufiĉe nombraj jaroj post la komenco de la XVI^a (katedraloj de Segovia kaj Salamanca, ekzemple), oni povas konstati paŝo post paŝo la evoluadon de la granda kristana stilo: Cuenca, Barcelona, Palma, Batalha (Portugalujo); Sevilla, la plej granda el la hispanaj...

Same kiel apud la importita romana stilo naskiĝis kaj evoluadis la populara mudeĥara stilo el brikoj, en la preĝejoj de humilaj vilaĝoj aŭ de malriĉaj kvartaloj de riĉaj urboj, la maŭridaj arkitekturistoj starigis konstruaĵojn kun speciala interesa stilo gotik-mudeĥara: ĉi tiu stilo kulminacias per la turoj de Teruel, XIII^a jarcento; per tiuj de Toledo, de la sama kaj sekvanta jarcentoj; per kasteloj, kiel tiu de Coca, de la XV^a jarcento (Segovia); per la preĝejoj de Illescas, Sahagún, Talavera de la Reina (Toledo) kaj multaj aliaj, ĉar oni ne povas kalkuli laŭcentoj la monumentojn de ĉi tiu arto tiel hispana kaj tiel bela; la juvelo de ĉi tiu stilo estas la klaŭstro de Guadalupe. La mudeĥarismo enpenetriĝas eĉ la plej aristokratajn kaj vastajn preĝejojn kaj en la kruciĝo de la katedralo de Toledo, klarvida kritikisto franca rimarkigis ĉi tiun markon, kiu hispanigas la gotikan stilon de nia grandioza plej altranga katedralo.

Ĉi tiu maŭra influo baptata, ĉi tiu mudeĥarismo, influante pli kaj pli ĉiufoje, atingas, je la lasta triono de la XV^a jarcento, krei la gotikan arton kiun oni nomas «elizabetha stilo», hispanega, en kiu la linioj de l'floranta gotika arto raviĝas parte, parte deteniĝas kaj ĉiam modifiĝas, produktante: la mirindaĵojn de Guadalupe; San Juan de los Reyes, en Toledo, kupolojn de Zaragoza kun arkajoj laŭ mahometana stelo; Lonjas (Lonĥas-kvazaŭ komercaĵborsoj) de Palma kaj Valencia; Reĝan Kapelon de Granada, Reĝan Kastelon de Manzanares; Palacon de l'Infantado, en Guadalajara; Domon de las Conchas, en Salamanca; Seminarion de Baeza kaj Pordon de Marchena, hodiaŭ en Sevilla... Se la strukturo kaj linioj, kiuj prezidas, estas gotikaj, la abunda ornamajaro montras la maŭran malamom kontraŭ la glataĵoj, kaj ĉu ĝi kovras per skulptaĵoj la ĉefan kapelon de San Juan de los Reyes aŭ la orumitan de la Katedralo de Salamanca kaj tiun de *los Vélez*, en Murcia; ĉu ĝi vivigas la fasadojn per rondaĵoj, akraj pintoj, kvazaŭ najlkapoj, kaj konkoj; ĉu ĝi prezentas la fasadojn laŭ vastaj entablementaroj kun densa ornamajaro (San Gregorio de Valladolid). La sama ŝato eble klarigas la kolorajn altarojn (Cartuja de Miraflores, Katedralo de Sevilla)...

Nur rapide oni rememorigas la plafonojn el maŭridaj ĉarpentitaĵoj, kiuj, multenombregaj en la tuta Hispanujo, vidigas mirindajn specimenojn de Tordeillas, de la salono de Linajes en la palaco de l'Infantado (Guadalajara); de San Juan de la Penitencia, en

Toledo; de l'salono de Koncilioj (Alcalá de Henares)...

Samtempa kun la fino de la «elizabetha stilo» aperas en Portugalujo la stilo «manuelino» («manuela»). Tial ke la portugala popolo trovis ĉe la maro la peron plenumi sian historian mision, kiam ĝi alvenas al la supro de l'grandeco naskas nacia stilon, kiu devenante de gotika radiko, akiras karakterizon singularan pro la naturaj elementoj—speciale maraj—, per kiuj ĝi abundege ornamas la fasadojn de Tomar kaj de Cintra, la kapelojn «Imperfeitas» kaj la klaŭstron de Batalha kaj Turon kaj Monaĥejon de Belén. Kaj bone atentu, por konscii kaj konstati la iberian fratecon, ke la kreinto de la «manuela» stilo estis naskiĝinta ĉe la norda centra montara parto de Hispanujo, estis Juan del Castillo.

Antaŭ ol eniri en la XVI^{an} jarcenton, ekvenas de Italujo la renesancaj formoj; tio, kio unue estis nekuraĝa enirigo de ornamantaj elementoj uzataj laŭ gotike kaj sklavigataj de la linio de la malnova arto, aŭ transplantado materiala de italaj verkoj, estis poste atingita unuiĝo ĉe la «platereska» stilo (fasado de la Universitato de Salamanca),—kiu estas kvazaŭ renesanca traduko de tiu de San Gregorio de Valladolid—. Kapelo de Santa Librada en la Katedralo de Sigüenza; Domoj de la Salina kaj de las Muertes, en Salamanca; Urbestrejo de Sevilla.

Sed sammaniere kiel la maŭra influo agis en la romanian stilon kaj en la gotikan, naskante la mude-

ĥaran arton respektivan, malgraŭ la dekadenco de la mahometa povo kaŭzata de la almilito de Granada, ankoraŭ ĝi estis forta por, kune kun la gotika, rezisti la premon de la renesanca stilo, kaj kiam ĉi tiu fariĝis nevenkebla, la mudeĥara enfiltriĝis en la verkojn konstruatajn laŭ la italmaniero, kaj klare aperante en la konstruaĵoj de l'«cisneriana» stilo (de la nomo de la Kardinalo Cisneros), el kiuj estas specimenoj la Salono Capitular de Toledo, la pordo de la Kapelo de l'Anunciación en la Katedralo de Sigüenza, la Kapelo kaj ĉefsalono de la Universitato de Alcalá, kaj ceteraj konstruaĵoj de tiu franciskano, kiu almilitis Oran kaj regis Hispanujon, de l'Kardinalo Cisneros.

La genio de Siloe, Covarrubias, Berruguete kaj aliaj starigis la bazojn de la hispana arto renesanca, originala kaj propra (Katedralo de Granada; Urbestrejo, de Sevilla; Monterrey kaj Kolegió de l'Ĉefepiskopo, en Salamanca; Universitato de Alcalá; fasado kaj korto de l'Alcázar de Toledo...). Sed, kiel ĉiam, la nekontraŭstarebla enkonduko de fremdaj formoj pretendis deflankigi la propran stilon: Machuca konstruas la Palacon de Karlo V^a per sama rigoreco, kian povis uzi itala arkitekturo de l'granda epoko; Vandelvira, la Sakristion de la Katedralo de Jaén; Diego de Torralba, la Preĝejon de la Concepción, en Thomar (Portugalujo), kaj Villalpando, la ŝtuparon de l'Alcázar de Toledo. Sed tiaj puraj klasikaĵoj ne enradikiĝis en nia lando,

tre malfavora je ornamsevereco; kaj se la volo de Filipo II^a starigas la titanan geometrian mason de l'Escorial, kaj kvazaŭ pro postulita imito oni starigas preĝejojn kaj palacojn ĉe la tuta Hispanujo, baldaŭ ekmodifiĝas mezuroj kaj proporcioj kaj oni abundigas la ornamaĵojn kaj elmontriĝas tuj la baroka potenco, kiu trovas en Hispanujo favoran grundon por longedaŭra kaj pompa floriĝo.

La barokismo—kiu ĝuste dirite ne estas stilo sed la parto komuna konvena al ĉiuj fazoj de l'arta evoluo iranta de l'klasika renesanca stilo al la akademia reakcio—naskiĝas en Hispanujo je la lastaj jaroj de la XVI^a jarcento—Chancillería de Granada (1580), Palacio del Viso, Sagrario de Toledo...—ĝi akcentiĝas firme ĉe l'tombejo de la Reĝoj de l'Escorial; dum la regado mem de Filipo IV^a, ĝi karakterizas la verkojn de Cano kaj la madridan kapejon de San Isidro, kaj dum la regado de Karlo II^a ĝi atingas la plej altan gradon, fariĝante nekontraŭstareble invadanta modo, kaj per la Churrigueras, Casas Novoa, Ribera, Hurtado Izquierdo, kiu laboras en Paular kaj en Granada, kaj Narciso Tome, atingas la mastrumadon de la artaj formoj por konstanta turmento al akademias celoj, malŝato al klasikuloj kaj francemaj kritikistoj kaj ĝojo al kiuj, sen antaŭjuĝoj, rigardadas la fasadon de la Katedralo de Santiago, la grandan placon de Salamanca, la Palacon de dos Aguas, en Valencia; la Seminarion, de Teruel; la Cartuja, de Granada, kaj la Transparente (lumtruon) de la Katedralo de Toledo. Al baro-

kismo moderigata de la akademiaj instruoj apartenas: la grandioza Reĝa Palaco de Madrid, unu el ĉefaj de Eŭropo; Sankta Domo de Loyola; la Monaĥinejo de Mafra, en Portugalujo; la Monaĥinejo de la Salesas Reales kaj la bela Palaco de Liria, en Madrid, k. t. p.

Ankoraŭ la neo-klasika arto, malgraŭ mankanta je hispanismo, prezentas en Hispanujo tre belegajn monumentojn: La Muzeo de l'Prado kaj la Observatorio, en Madrid; la Katedralo de Cádiz; la Preĝejo de Santa Victoria, en Córdoba, la Pordo Liana de la Katedralo de Toledo, estas konstruaĵoj antaŭ kiuj la vojaĝanto povas rehavigi al si la spiritan trankvilecon, kiun malkvietigis la *ĉurigerismo* (malmoderigata barokismo abundega je ornamaĵoj). Don Ventura Rodríguez kaj don Juan Villanueva estis la plej grandaj arkitekturistoj de tiu ĉi periodo.

Estas malagrade kaj malfacile paroli pri la nuntempo, sed por la turisto estos utila indiki, ke la nacia iniciativo ankoraŭ elmontriĝadas sur nuntempajn verkojn. Neniu scias kiel la venontaj generacioj juĝos la originalan aŭ ekscentran entrepenon de Gaudí planantan kaj ekkonstruantan la Preĝejon de la Sagrada Familia (Sankta Familio) de Barcelono, nek kion ili pensos pri la urbaj konstruaĵoj de Bilbao, Madrid, Barcelono kaj ceteraj urboj progresantaj, kiuj stariĝadas antaŭ niaj okuloj. La fremdulo eble trovos ĉe ĉi tiuj verkoj la nacian karakteron kaj la bonegatojn, kiujn ni, pro troa proksimeco, ne povas facile percepti.

Forto, dinamismo, manko de mezuro, reveco, originaleco, nekongruenco, pasio, strangaj devenoj, manko de kontinueco por la laboro, superregado de la emociaj valoroj sur la teknikajn elementojn: diverseco, diverseco, diverseco, jen la trajtoj de la hispana arkitekturo.

ĜARDENOJ.—Amasoj el naturaĵoj kaj arto estas la ĝardenoj, kiuj abundegas en Hispanujo, ĉar la klimato kaj la grundo de multaj regionoj estas favoraj, kaj la araboj lasis al ni emojn, instruojn kaj specimenojn. Forlasante pritrakti tiujn kiuj estas naturaj en multaj lokoj, kiuj abundas en Valencia, Balears, Andalucia kaj Galicia, kaj ne parolante pri tiuj de la klaŭstroj kaj monaĥejoj, lokoj de paco kaj trankvileco, nek pri tiuj publikaj, kiuj, kvankam ofte grandaj kaj zorgeme kulturataj, perdis hispanan karakteron, kaj, en iuj urboj, jam reakiras la karakteron tiuj ĝardenoj, oni devas citi tiujn kiuj invitas al vizito pro siaj belaĵoj specialaj: tiujn de l'Generalife, Alcázar de Sevilla, Cuarto Real de Granada, Cadalso de los Vidrios (Madrid), restaĵojn de la Abadia (Abatejo) en Salamanca, Aranjuez, La Granja; Casa del Príncipe (Domon de l'Reĝido) kaj ĝardenon de la monaĥoj, en El Escorial; Parkon de Maria Luisa Fernanda, en Sevilla. La liston oni interrompas ĉar oni bezonus kelkajn pagojn por ĝin plenigi.

LA SKULPTARTO

La hispana skulptarto estas elmontraĵo malmulte pli konata kaj estimata ol nia pentrarto, kaj evitante neĝustatempajn komparojn, ni diros ke ĝin oni devas konsideri atenteme.

De la iberiaj tempoj—Dama de Elche, statuoj de l'Altano de la Santos (Sanktuloj), reliefoj de Osuna, antropoida tombo de Cádiz, sfinkso de Balazote...—ĝis nun—Mogrovejo kaj Julio Antono, parolante nur pri mortintoj—la hispanaj plastikajoj vidigas senintermankan serion el grandvaloraj monumentoj.

Dum la plej mallumaj jarcentoj de l'Mezopoko, oni skulptis la vicgotajn kapitulojn kaj impostojn de San Pedro de la Nave, la vertikalajn pordflankajojn de San Miguel de Liño, la Medalionojn de Santa María-de Naranco (Oviedo), la tombon de Bribiesca (Burgos) kaj la baptujon de San Isidro de León. La araboj malamis reprezenti estaĵojn, tamen, ili ĉizis

kaj skulptis kofretojn el eburo kaj banuojn, kaj ili trafis tian teknikan kapablecon, ke, influante la kristanajn landojn, ili naskis la skolon pri eburajoj de l'Kortego de Ferdinando I^a de León, kiu produktie ravantajn eburartajojn—Kriston de l'Arĥeologia Muzeo de Madrid kaj tiujn eburajojn de San Millán, kiuj ne havas rivalaĵojn—, kaj arĝentajojn kiel la kofretojn de la Cámara Santa de Oviedo kaj de San Isidro de León.

Dank' al kapableco akirita de la kristanoj el la maŭroj, kaj eble dank' al maŭraj manoj partoprenantaj la laboron, oni skulptas la romanstilaj kapitelofn kaj la grandajn reliefojn de Silos de la XI^a jarcento, kaj je la alveno de l' XII^a, oni skulptas la portalon de la Platerias de l'Katedralo de Santiago; malmulte da tempo poste la eksteran portikon de Ripoll, la portalon de San Vicente en Avila kaj la grandajn klaŭstrojn de Estany (Cataluña), San Pedro el Viejo (Huesca), San Cugat de Vallés (Barcelona), skulptitan de Arnal Catel, kaj tiun de la Katedralo de Gerona, kiu estas la plej vasta de Hispanujo. Ĉi tiuj kaj aliaj multaj verkoj pruvas kiel la franca influo akiras hispanajn formojn, dum akcentigas la personeco de l'regionaj kaj lokaj skoloj, atingante tiamaniere miraklon veran, la eksteran Portikon de la Gloria en la Katedralo de Santiago, skulptitan de Mafeo kaj datumitan je 1188, eble la plej mirigantan paĝon el la historio de la kristana skulptarto.

La hispana gotika arto turnas sian rigardon al Francujo kaj, estu kiu ajn nia kunlaboro por ĉi tiu arto je ĝia komenco aŭ origino, la pilgrimadoj al nia lando alvenigis artistojn, instruojn kaj eburajn skulptaĵojn.

La fasadoj de la grandaj preĝejoj—Katedraloj de León, de Burgos—, la tomboj de San Vicente (Avila), de Ciudad Rodrigo, Huelgas de Burgos, de Doña Mayor Guillén (Alcocer-Guadalajara), la Virguniloj de l'lumportilo de León kaj de la altaro por frumatenas meso de Toledo, kaj multenombraj aliaj verkoj proklamas la francan influon decidigan; sed neniam niaj artistoj forgesis marki siajn skulptitaĵojn per naciaj karakterizoj montrantaj viglan kapablecon kaj pasion.

La XIV^a jarcento karakteriziĝas ĉar kvankam persistadas regante la franca influo, tamen, alvenas al Aragona regno iuj italaj skulptistoj (tombo de Santa Eulalia, en Barcelona, 1339; tombo de l'ĉefepiskopo Don Juan de Aragón, en la Katedralo de Tarragona). En Navarra kaj Cataluĝna atingas grandan floriĝon la francstila skulptarto, sed ankaŭ Toledo, León kaj Burgos, posedas riĉajn ornamaĵojn, kapitelojn kaj tombojn de la XIV^a jarcento, tre interesajn sed ne kun granda beleco. La arto de la XIV^a jarcento estas malmulte originala, kaj la plastiko prezentas malgrandan belecon en Francujo kaj Hispanujo. Oni devas kompreni bone, ke ĉe la historio pri l'arto, la divido laŭ jarcentoj ne alĝus-

tiĝas rigore al la kronologio; tial iu verko el tiuj de l'arto de la XIII^a apartenas al la XIV^a.

La hispana skulptarto de la XV^a jarcento estas tiel valora kiel tiu de la XIII^a pro sia geniece kaj energio, kaj ĝi supermezuras tiun ĉi pro sia delikateco. Al la influo konstanta de Francujo kaj al tiu de Italujo kuniĝas je tiu epoko tiuj de Flamandujo kaj Borgonjo; Sagrera, en Mallorca, sin montras pli progresanta per siaj verkoj ol la eŭropa arto samepoka; tipa estas la okazintaĵo de Pamplona pro starigo de la tombo de Karlo la Nobla skulptita de Janin de Lome de Tournai en la Katedralo (1416), kaj ne forgesu, ke estis en Dijon granda artisto, en la rondo de Claus Sluter tiam, Juan de Huerta. Ĉi tiu francaflamanda stilo, kiu en Castilla produktas la apudigitajn maŭzoleojn de la kapelo de l'Condestable en la Katedralo de Toledo, tiun de l'Kardinalo San Eustakio en Sigüenza, kaj kiu vidigas en Sevilla per la verkoj de Mercadante de Bretaña, koincidas en Aragón kaj Cataluña kun la naskiĝo de la vastaj altaroj—tiel karakterizantaj altgrade la hispanajn preĝejojn—, kiel tiu de Tarragona, verko de Pere Johan de Vallfogona kaj Guillen de la Mota, tiu de la Katedralo de Vich, k. c., sur kiuj jam oni rimarkas la giotan pentrarton (stilo de Giotto).

Estas la XV^a jarcento tiu dum kiu pli da fremdaj artistoj alvenas al Hispanujo: stimulataj de la deziro

ne esti supermezurataj de tiuj, la hispanaj Pablo Ortiz, Pedro Millán, Sebastián de Almonacid, Vallfogona kaj multaj aliaj alten subtenas la flagon de nia arto, kiu samtempe montriĝas kun firmaj karakteroj sur la verkojn de l'fremduloj ĉi tie starigintaj iliajn laborejojn: tiel decidanta estas la influo de Hispanujo en tiujn kiuj ĉe ĝi starigas siajn hejmojn! Lorenzo Mercadante de Bretanjo, en Sevilla; Juan Guas, Peti Juan, Copin de Holanda, Juan de Bruselas, Juan Sánchez Alemán en Toledo; Juan de Malinas kaj Teodorico de Alemania, en León; Gil de Siloe, Felipe Biguery kaj iuj Colonias, en Burgos; Egas Cueman, en Guadalupe; Rodrigo Alemán, en Plasencia, Sigüenza, Ciudad Rodrigo kaj Toledo—la listo estas nefinebla—apartenas prave al la historio de la hispana skulptarto.

La maŭzoleoj de la fino de la XV^a jarcento estas nombregaj: belegaj estas tiuj de la Cartuja, en Burgos; tiu kiu devenas de Fredesval, la skulptitaj de Egas en Guadalupe, tiuj de Tendilla (Guadalajara), kaj la superegaj de l'Katedralo de Sigüenza, el kiuj tiu de l'*Doncel*, ravanta tombo, kulminacias laŭ arto kaj beleco.

La sama plaĉo al abundeco da ornamadoj kovranta la romanajn kaj gotikajn portalojn per statuoj kaj skulptitaĵoj, metanta ĉe la absidoj grandegajn altarojn (ekzemple tiujn de Sevilla kaj Toledo) aperas en la seĝaroj de la ĥorejoj, el kiuj Hispanujo posedas pli ol iu ajn alia nacio, ankoraŭ dum la XV^a jar-

cento (León, Nájera, Santo Tomás de Avila, Cartuja de Miraflores en Burgos, la suba seĝaro de Toledo, Ciudad Rodrigo, Plasencia, k. c.)

La itala renesanco, kiu prezentigas la unuan fojon per la reliefoj de la posthorejo de la Katedralo de Valencia, skulptitaj de Giuliano Florentino, enpenetras je l'fino de la XV^a jarcento kaj komenco de la XVI^a tutplene, ĉu per konstruaĵoj tute finitaj—eble per la tombo de la granda Kardinalo Mendoza en la ĉefa Katedralo (Toledo), kaj certe per tiu de Cardona en Bellpuig (Lérida), skulptita de Giovanni da Nola; per tiu de la Reĝido Don Juan, en Santo Tomás (Avila), skulptita de Domenico Alexandro Faucelli; per tiuj de la Reĝa Kapelo de Granada; per tiu de l'Kardinalo Cisneros, en Alcalá; per tiuj de la Fonseca, en Coca (Segovia); de la Riberas, en Sevilla; kaj de l'Episkopo Ruiz, en San Juan de la Penitencia (Toledo); ĉu per italaj artistoj, kiuj laboris ĉe ni, kiel Moreto, Jacobo Florentin, Pietro Torrigiano; ĉu per hispanaj artistoj, kiuj estis en Italujo.

La hispana skulptarto de la XVI^a jarcento kalkulas famegajn nomojn: Alonso Berruguete—en kiu la gotika spirito, forte soifanta je emocio, baraktis kun la klasikaj formoj, rompante ĉi tiujn la troeco de l'esprimo—, Zarza, majstro pri la ornamenta ĉizarto; Damián Forment, kiu en Aragón skulptis altarojn, skulptante kaj ĉizante sperte kaj facile ĉu

gotike ĉu renesance; Bartolomé Ordóñez, kiu itals-tiliĝas tiamaniere, ke li estas fidela sekvulo de Fan-celli; Diego Siloe kaj Pesquera, kun klasika majst-treco; Juan de Juni, kiu, je plena XVI^a jarcento, skulptas baroke; Gaspar Becerra kaj Esteban Jordán, kiuj manierigas; Monegro, kiu, per iuj verkoj siaj, sin prezentas sekvante la mikaelangelanojn malplenajn je spirito, kaj per aliaj montras ravan klasikan stilon; Pompeo Leoni hispaniĝinta, ĉiam korekta kaj ĉiam iom senesprima...

La XVII^a estas la jarcento de la granda skulptarto el ligno diverskolorigita: ĝia floriĝo estas samtempa je tiu de la pentrarto. Klare vidiĝas du skoloj: la Kastiljana, kies sidejo estas Valladolid, kiun estras Gregorio Fernández, naskiĝinta en Galicia, kaj la Seviljana (de Sevilla), estrata de Juan Martínez Montañés. Alonso Cano, klasika spirito, pretendas liberigi la hispanan skulptarton el vulgareco en kiun ofte falis liaj antaŭuloj; kaj liaj disĉiploj Mena kaj Mora, tirate de la idealema reakcio, tro-pasie, trograndigante la delikatecon, trafas la falsaj-on. Dume Manuel Pereira, en Madrid, skulptas fervore kaj vere.

Dum plena regado de l'barokismo oni ne povas lasi sen mencio Roldán, Risueño, Duque Cornejo kaj Ruiz del Peral, kiuj en Sevilla, Granada kaj Córdoba, daŭrigas la sukcesegon de la lignaj ĉizita-joj diverskolorigitaj, kiun vidigas la superegaj verkoj de l'altaro de la Caridad, en Sevilla, skulptitaj

de la unua. kaj la seĝaro kaj predikejoj ĉizitaj de la tria.

Dum la XVII^a kaj XVIII^a jarcentoj kaj dum niaj tagoj, oni laboris kaj laboras en Hispanujo la skulptarton sur koton, diverskolorigante la skulptitaĵojn, kies karaktero estas akcentate populara; arto kiu nur, pro la materio uzata, povas prezenti, kiel praulojn, Olarte Torrigiano kaj Pedro Millán; sed kiu per Kristnaskaj figuroj, super ĉio, prezentas graciajn modelojn eĉ plenesprimantajn.

La XVIII^a jarcento produktas ankaŭ famegan skulptiston, Salcillo, kiu dum epoko de granda dekadenco, konservante la malnovan tradicion de la revantaj majstroj, atingas, ne sen impresigoj, enradikiĝi en la internaĵon de la popolo; kaj skulptistion Roldana, kiu al sia seksa delikateco kunigas la delikatajn barokajn esprimojn, kiuj estas plej propraj ĉe tiu ĉi jarcento. Luis Salvador Carmona, en Salamanca kaj Madrid, revivigas iel, la idealojn de Gregorio Fernández kaj de Pereira, sed sen la fervoro tirata de la epoko.

La neoklasika spirito prezentas vante la nomojn Felipe Castro kaj Manuel Alvarez el *Griego*, tiel malvarme ŝatataj.

La XIX^a jarcento, pro sia proksimeco al ni, ne povas esti juĝata de ni juste: la frukto estis abunda,

kaj ni estimas ĝin tiel manka je profundeco kaj emocio, kiel riĉa kaj luksa.

Vallmitjana, Querol kaj Mogrovejo, estas eble la plej kleraj hispanaj skulptistoj de la XIX^a jarcento —inter la mortintaj—, sed estas certe ke ilia arto ne estis enradikigata ĉe nia tradicio; eble tio ĉi lasta estas la sola koincido de l'tri cititaj artistoj.

Pri la XX^a estas frue paroli: la vojo irata de iuj por reveni al la tradicio, kvankam danĝera falis en imititaĵojn, tamen liberigas el la franca kaj itala servutoj de l' XIX^a jarcento, kiu donis tiel malbonan nedaŭran frukton; kaj eble, enprofundiĝante en la pasintecon, niaj skulptistoj trovos la animon de la raso, kiun ili devos vesti per modernaj formoj por krei veran arton.

LA PENTRARTO

La monumentoj de Hispanujo prezentas al vizitanto nombregajn trezorojn el pentraĵoj spite de la tempo, spite de malatento kaj rabemo de invadintoj kaj forprenantoj.

Nura citado postulus volumojn: ĉi tion pruvas nur pensi kion signifas la hispana pentrarto, kiu kune kun la teatro estas, evidente, la alportitaĵo plej grandega de la Preskaŭinsulo hispana al la universala sentemo.

La groton de Altamira oni estas nominta *Kapelo Sixtina* de l' kvaternara arto; la realecon de ĝiaj pentraĵoj reprezentantaj bestojn laŭ movaj pozoj, kroniko pri ĉasado de iu tribuo, kiam ĉasadokupo estis la plej honora kaj profitdona entrepreno inter la homoj—estus neklarigebla miraklo se novaj esploradoj ne estus malkaŝintaj karakterojn samajn pri

beleco por la dekoracio de aliaj grotoj kaj rokoj —Cándamo (Asturias), Covalanas, Peña Tú (Penjaro-ro-Tú), Puente Viesgo (Santander), Alpera, Calapatá, Valltorta, k. c.

Se ĉe la arto mem oni volus konsideri la pentriston de la groto de altamira kaj Goya'n (Goja'n), oni konstatus, kiel post jarmiloj persistadas, ĉe la moderna arto, la vidakreco kaj la kuraĝo por nature reprezenti la ĉirkaŭantan vivon, pro kio la prahistoria pentristo estas vere la antaŭulo de la senmorta surdulo.

Sed, eĉ ne aludante tiel malproksimajn originojn, la esenco de la hispana pentrarto havas tre solidan teknikon, kaj tute klare montriĝadas ĝia historia kontinueco.

Ne atentante la pentraĵojn de la iberiaj vazoj, kaj pasigante kelkajn jarcentojn, de la dekoracio de la supozata domo-baziliko de Merida kaj de tiu, kiu kovras la murojn de Santullano de los Prados (Oviedo), kiujn oni povas kompari kun la romanaj pri tekniko kaj spirito, ankaŭ ne atentante la gotajn kaj mozarabajn librojn, oni povus konkludi, ke la komenco de nia pentrarto aperas kun la pentraĵoj de la ermitejo de San Baudelio de Casillas de Berlanga (Soria), rimarkinda konstruaĵo pro ĝia arĥitekturo; sed ankoraŭ pli, ĉar la murpentraĵoj prezentas profanajn scenojn—ĉasoscenojn, ekzemple—pentritajn je la fino de l' XII^a jarcento. Samtempaj se ne antaŭaj estas la pentraĵoj de la Tombejo de

San Isidoro de León, de la jaro 1180 proksimume; ne tiel artdelikataj sed ankaŭ tre intereseĝaj estas la katalunaj murpentraĵoj, hodiaŭ parte ĉe l' Muzeo de Barcelona, kaj tiuj de l' Cristo de la Luz (Toledo), nur atentante la plej rimarkindajn.

En la XIII^a jarcento ekaperas la *antependios* (pen-
traĵoj per kiuj oni kovris la flankojn kaj antaŭaĵon
de la altartabloj, aŭ skulptaĵoj, oraĵoj, k. t. p., por
la samo), el kiuj la Episkopa Muzeo de Vich posed-
as multajn, kaj ju pli la jarcento antaŭeniras, des
pli abundas la preĝejoj kun pentritaj muroj; en 1262,
Antón Sánchez de Segovia subskribas la dekoracion
de la kapelo de l' Aceite (Oleo) aŭ de la Torre (Turo),
ĉe la malnova Katedralo de Salamanca. Dum la
XIV^a eniras tra Oriento la pentrarta influo de Siena,
kaj dum la lasta triono de ĉi tiu jarcento alvenas al
Castilla (Kastilujo) kaj eble al Portugalujo, fama
giota pentristo: Gherardo Starnina, la unua influo
disvastiĝas en Aragono, kaj la dua aŭ giota en
Kastilujo, kaj stariĝas diferenco inter la influo de
Siena kaj tiu de Florencia, kiu markas la sekvantan
artan produktitaĵon.

En la mezo de la XV^a, la flamanda influo montri-
ĝadas: Luis Dalmau pentras la Virgulinon de la
Concelleres (Konceljeres), 1444 (Barcelona); en
Castilla, Jorge (Ĥorĥe) Ingles estas pentristo de
l' markizo de Santillana, kaj samtempe, en Salaman-
ca, Nicolás Florentino—eble la mistera Dello—pen-

tras la malnovan Katedralon; kaj en Nápoles direktas la pentrartan movadon Jacomart Baço, ĉe l'kortego de Alfonso V^a la *Grandanima*.

Castilla ligas la influojn de Italujo kun la instruoj flamandaj, kaj dum Fernando Gallego sin inspiras per la verkoj de Van Eyck, Pedro Berruguete spertigas, eble, ĉe la norda Italujo.

Al Sevilla alvenas iu influo venecia; en Cataluĝna kaj en Valencia, Vergos kaj Osona majstre regas la koloron, kaj Bermejo en Aragón kaj Cataluĝna profitas la lernitajn lecionojn per la pentraĵoj sur ligno de Flamandujo kaj ne malŝatas ornami siajn pentraĵojn per tro reliefaj orumitaj gipsaĵoj, kiujn ŝatis la hispana luksega plaĉo.

Aliparte, de Juan II^a (Johano II^a), niaj reĝoj sin montras emaj al la flamanda pentrarto. Ili, per ripetataj akiroj, importas nombregajn verkojn, kaj la Katolikaj Gereĝoj havigis al si gravegan, riĉan, abundan kolekton, el kiu ankoraŭ restas granda parto en la Reĝa Kapelo de Granada.

Portugalujo, de la mezo de l'XV^a jarcento, posedas sukcesantan skolon, kiun prezidas Nuno Gonçalves, eksterordinara artisto, kiu per siaj pentraĵoj sur ligno de la altaro de San Vicente—hodiaŭ ĉe la Muzeo de Lisboa—sin montras tiel kuraĝa por kopii la naturaĵojn kaj lerta pri la harmonia firmeco uzi la koloron.

La hispana pentrarto de la XVI^a jarcento estas karakterizata de la itala influo. Je la komenco de la

jarcento, tie estis Fernando Yáñez (Janjes) de la Almedina kaj Fernando Llanos, disĉiploj de Leonardo Vinci, kiuj en Cuenca (Kuenka), Valencia kaj Murcia, lasis rimarkindajn verkojn. Alonso Berruguete ankaŭ estis en Italujo. Luis de Margas alportas al Sevilla ion el la gracia arto de Corregio. Becerra, Barroso kaj Céspedes manierigas laŭ la mikaelanĝelemuloj. Navarrete la *Muta* uzas la koloron laŭ la Venecia skolo, kaj montriĝas certa granda estonta artisto, kiun bedaŭrinde la arto perdis antaŭtempe. Morales la *Dia* trovas facilan laborkampon sed malgrandan, kiu, per la aplaŭdo de la fervoruloj, donas al li ĉiaman famon. Sánchez Coello sekvas Moro'n kaj estas origino de la skolo el kortegaj portetristoj.

Samtempe kiam niaj pentristoj iras al Italujo kaj tie ili trovas inspiron, venas de tie Julio de Aquilis, Alessandro Mayner, la flamandoj italogitaj de Sevilla kaj la *skorialaj* (tiuj de l'Escorial), kaj eniras ĉe ni nombregaj italaj pentraĵoj, Tiziano estas pentristo de Karlo V^a; Filipo II^a, preskaŭ de la knabeco, mendas pentraĵojn al la genieco de Cadore, kaj je la matureco elpensas kaj direktas El Escorial'n regate de fiksideo por kovri ĝiajn vastajn murojn per superegaj pentraĵoj; la eminentaj pentristoj ne povis aŭ ne volis veni; la ambasadoroj de l'Katolika Reĝo sendis la plej famajn; neniu kontentigis la Reĝon. Filipo II^a tre sperta pri arto, ne komprenis la *Greco'n*, kiu plenigadis Toledo'n per sia religifervora genieco; sed ĉi tiun nekomprenon li kom-

pensis supermezurve per ampleksa plaĉo ŝatanta la primitivajn flamandajn pentristojn, amanta la veneciajn kaj restiganta Moro'n por sia pentroservo.

Ĉiuj tiuj ĉi elementoj de la pentrarto, kvazaŭ bolante dum unu jarcento, rezultigis nian pentrarton, kiu dum la XVII^a jarcento atingas altan rangon inter la plej rangaj: Ribalta, Rivera, Zurbarán, Velázquez, Alonso Cano, Carreño, Murillo, Valdés Leal, Claudio Coello... estas gloraj nomoj tutmonde konataj. Skoloj de Valencia, de Madrid, de Sevilla, estas klaraj nomoj.

Du specialajn rimarkojn estas konvene vidigi: ke la kolekto da pentraĵoj de l'Hispanaj Reĝoj influis decidige la disvolvadon de nia pentrarto, kaj ke, eble pro tio kaj pro nia sendependeco, marko de nia karaktero, ĉi tie apenaŭ kreigas persona skolo, kaj ekzemplo vidigos ĉi tion: la madridaj pentristoj, posteuloj de Velázquez, preskaŭ ne sekvas lin—eĉ nek liaj disĉiploj; ekzemple lia sklavo Juan (Johano) de Pareja (Pareña)—; ili iras al la fontoj kaj ne al la rivero, kaj ili sin liberigas el la malestiminda aljuĝo *imitanto*, studante la majstrojn de Velázquez: la veneciajn kaj flamandajn pentristojn kaj la *realojn*.

La XVIII^a jarcento, kiu estas dekadenca por la nacia spirito, karakteriziĝas per alveno de francaj kaj italaj pentristoj, kiujn venigis la Borbonaj Reĝoj; sed same kiel la influoj de Italujo kaj Flamandujo okazigis je la Renesanco la superegan flo-

radon de l'XVII^a jarcento, la verkoj de Honasse, van Loo, Amiconi, Giaquinto (Ĥiakinto) kaj super ĉio tiuj de Tiepolo kaj de Mengs – kiuj pentris la reĝajn palacojn, fruktigis eble unu el la plej fortaj pentro-personecoj de l'tutmonda arto: Don Francisco'n de Goya.

Ju pli la tempo pasas, des pli Goya akiras famon; li kun *Greco* kaj *Velázquez* formas la superegan triunuon de nia pentrarto, la tri, pli streĉe ligataj, ol oni povas konscii kaŭze de la tempospaco inter ili, kronas la supron, kiu estas ideala deirloko de la moderna pentrarto. En la verkojn de ĉi tiuj grandaj geniuloj turnis siajn okulojn la francaj impresemuloj kaj la germanaj esprimemuloj, ĉiuj artistoj en tute, kiuj celas supermezuri la klasikan pentrarton. *Greco*, *Velázquez* kaj *Goya*, krom krisoloj en kiujn fandiĝis la plej diversaj fluoj de l'pentrovivo, estas neelĉerpoteblaj fontoj de aktuala kaj estonta profito. Ili estas la plej pentristoj el ĉiuj estintaj pentristoj.

La XIX^{an} jarcenton malfermas Goya kaj ĝin fermas Sorolla per sia triumfo en Parizo: inter ili oni devas loki Vicente López, Alenza, Federico Madrazo, Fortuny kaj Rosales.

La nuntempa hispana pentrarto estas inda je la antaŭa kaj supermezuras la nuntempan de l'ceteraj nacioj. Niaj pentristoj triumfas eksterlande kaj Hispanujo daŭrigas sin montrante lulilo, kiel ĉiam, de geniuloj; hispana estas Pablo Picasso; apostolo de l'*Kubismo* kaj papo de la plej radikalaj tendencoj

de la pentrarto: estas arbitre kondamni lian arton kaj nejuste nei valoron al lia laboro; nekompreno ne rajtas aljuĝi anatemojn, kaj ĉiu novaĵo rajtas esti respektata, ĉar oni scias ke hodiaŭaj revoluciemuloj estas morgaŭaj klasikuloj.

INDUSTRIAJ ARTOJ

La industriaj artoj, t. e., la beligo de la aĵoj por nia kutima uzado, estas la plej bona elpruvilo pri la civilizacio de iu popolo. La ceramika arto, t. e., la ornamado de la ilaro uzata por la manĝaĵoj kaj manĝado; la teksarto aŭ beligo de la teksaĵoj, kiujn, de ilia deveno, oni teksis por beligi, ĉar eĉ unukoloraj kaj simplaj ili estas pli ornamaĵoj, ol ŝirmilo aŭ vualo, estis kaj estas en Hispanujo vigle atentata, havante gravan kaj sinsekvantan disvolviĝadon de la malproksimaj epokoj de la prahistorio.

De la bronzneolita ceramiko de Ciempozuelos kun inkrustitaĵoj el blanka pasto formanta komplikitajn desegnojn, ĝis la iberia de Numancia kaj Sagunto kalkulante la majstrajn verkojn de Archena (Arĉena) kaj Azaila, Hispanujo supermezuras la ceteron de l'mondo pri ceramiko dum la Antikva Epoko, esceptante Grekujon kun ĝiaj produktitaĵoj de Creta.

La hispana mezepoka ceramiko havas mirigantan variecon. Ĝia plej granda gloro estas esti liverinta kaj enradikiginta en Eŭropon la fajencon kun meta-

liaj reflektoj, montrante kiamaniere popolo sentis arton kaj ĉi tiun praktikis por fabriki el facilrompebla kaj humila koto la plej luksegajn telerarojn kaj manĝovazarojn. Samtempe, kiam en Málaga kaj Valencia oni laboris la orumitan ceramikon, la verda, nigra kaj blua, atingis intensan disvolvon en Teruel kaj en Paterna.

Je la komenco de l'renesanca influo, Talavera de la Reina tradukas popolsenteme la belegajn formojn de Urbino, Gubbio kaj Castel Durante, kaj de la XVI^a jarcento al XVIII^a, ĝi disvastigas siajn ceramikaĵojn tra la tuta Hispanujo. Francisco Niculoso-Pisano vizitas Sevilla'n, kaj ĉi tie restadas dum kelkaj jaroj; per la manoj de liaj hispanaj disĉiploj, la arto de l'majstre delikata ceramikisto perdás teknikon kaj delikatecon, sed ĝi gajnas helecon, brilecon kaj dekoracian forton.

La eŭropeigantaj tendencoj de la XVIII^a jarcento instigas la grafon de Aranda fondi la fabrikon de Alcora por fajencaĵoj, kiu devis persistadi sen popolaj enmiksaĵoj aŭ influoj. Pli izolita estis ankoraŭ la fabriko de l'Buen Retiro, kiun starigis Karlo III^a, tiel malmulte hispana je la komenco ĝi estis, ke eĉ la termaterialojn oni alportis al ĝi el Napoles. Fine, Sagardelo, en Galicia, dum la unua triono de la XIX jarcento konkuras kun la fabrikoj de Anglujo.

Nuntempe, en Manises, en Sevilla kaj en Talavera, renaskiĝas nia malnova ceramiko.

La vitraĵojn de Cadalso (Mádrid), Cuenca, Cas-

tril kaj María (Granada), Mataró (Cataluña), altestas kaj reserĉadas kolektemuloj; eble studo pri ili konstatos, ke multaj specimenoj, konsiderataj ĝis nun kiel fremdaj, estas hispanaj.

En La Granja (Granhá), Karlo III^a starigis fabrikon por kristalaĵoj, kiu imitis tiujn de Bohemujo kaj de Venecio.

La *guadamaciles* aŭ *guadamacies* (nomo hispana devenanta de la urbo Gadames—Tripolitano—) estas stampitaj ledoj. kiujn en Hispanujo oni nomis *cordobanes*, ĉar oni laboris ilin en Córdoba, kaj ĉi tiu laboro estas tipa kaj fama industria arto kun ankaŭ speciala marko orienta; el ĉi tiuj stamplaboritaj ledajoj oni faris plakojn por kovri la altartablojn, por la fundo de skulptitaĵoj ĉe la altaroj, kofrojn kaj bindaĵojn: oni laboris ilin per ferlaboriloj por reliefigi ilin kaj poste oni pentris ilin, kaj, fojojn, oni nuancis ilin el oro por pligravigi ilian riĉecon.

La metalarto havas en Hispanujo glorajn tradiciojn: tial ke la lando estis riĉa je oraj, arĝentaj, kupraj kaj feraj minejoj, de la plej antikvaj tempoj oni laboris la metalojn.

La abundeco da oro, antikve troega en Galicia; kaŭzigis la nombregajn kolringojn, ĉu insignojn, ĉu ornamaĵojn, praromanajn, kiujn oni trovis eĉ trovas ankoraŭ en la *mámoas*, prahistoriaj funebraj kaj religiaj monumentoj, kiuj abundas en Galicia kaj

Portugalujo; kaj ĉe regionoj ne tiel riĉaj aŭ mankantaj je oro, sed plej civilizitaj de la arta vidpunkto, oni laboris la trezorojn de Jávea kaj de l'Aliseda.

De la Mezepoko, je la komenco, estas la kronoj de Guarrazar, mirigantaj visgotaj juveloj; kaj dum la jarcentoj de la komenciĝanta realmilito, kiujn oni konsideris nekleraj aŭ mallumaj, atestas delikatan arton la kofreto de la Cámara Santa de Oviedo (Sankta Ĉambro) aŭ ĉambro de l'agatoj, la Krucoj de l'Anĝeloj kaj de la Victoria (Venko)... Estus senfine citi la arabajn juvelojn kaj specimenojn el delikata romana kaj gota industrioj; sed necese estas menciigi la mirigantan serion da emajlajoj—kies hispanecon ankoraŭ oni ne pruvis—de San Miguel *in excelsis*, de Silos, de Roncesvalles, Virgulinon de la Vega (Salamanca), la kuŝantan statuon de don Mauricio (Burgos).

Estas miriganta kaj abundega la kvanto da oro kaj arĝento troviĝanta ĉe la trezorejoj de Katedraloj kaj de aliaj multaj preĝejoj kaj kapeloj de Hispanujo; nur rememoru la Hostiulojn de l'Corpus—tipajn Hispanaĵojn—, la plej riĉajn liturgiajn ilarojn kaj meblarojn, kiuj, dum la XVI^a jarcento kaj dank'al majstreco de Arfes, Becerriles, Alvarez, k. c., atingas nivelon, kiun la defikata metalindustrio, aŭ ĉizarto de metaloj, neniam atingis en aliaj nacioj.

Pri bronzaĵoj, estas nekalkulebla tio kion la hispana arto produktis; ĉu oni atentigas la oferitaĵojn kiujn konstante oni malkovras per elfosaĵoj ĉe iberiaj

ruinoj de urboj kaj tombejoj; ĉu la mantenilojn de ponardoj kun inkrustitaĵoj el arĝento; ĉu la bukojn laŭ broĉo aŭ neperdebla nuntempa pinglo kaj la bridferaĵoj de l'ĉevaloj; la gotajn restaĵojn; ĉu, fine, saltante jarmile, la renesancajn bronzojn de Cristóbal de Andino, de Vergara, de Juan de Arfe kaj de Celma.

Ampleksegan spacon okupas priskribo pri la ferlaboritaĵoj, kvankam nur ni volus citi la seriojn plej altvalorajn: la famegajn armilojn—iberiajn, gotajn kaj mezepokajn, ĉu arabajn, ĉu kristanajn—; la forĝitan kaj ĉizitan kradaron, kiu venante de la XIII^a jarcento, de Salamanca, Zamora kaj Cataluña, alvenas al la XV^a kaj XVI^a atingante eksterordinaran perfektecon kaj belecon, rimarkindegan arton, per Juan Francés, Domingo de Céspedes, monaĥo Francisco de Salamanca, majstro Bartolomé, Andino, Villalpando kaj Arenas, kiuj en Alcalá, Toledo, Guadalupe, Granada, Burgos, Cuenca, k. t. p., forĝis kaj ĉizis la kradojn, kiuj majeste fermas grandiozajn kapelojn. Kaj same oni povas diri pri kandeligoj, kandelabregoj por nombraj kandeloj kiel la famega de la Katedralo de Sevilla, ventoturniloj, krucoj, ŝlosiloj kaj multenombraj aliaj serioj da objektoj por la kulto aŭ por la komuna popola uzado kaj kiuj estas tre abundegaj ĉe ĉiu loko de Hispanujo.

Ankaŭ pri teksitaĵoj prezentas Hispanujo mirindan historion de la ŝtofoj el sparto, tiel malnovaj kaj

perfektaj kiel la egiptaj. Sed, same, kiel pri ceramiko, ni ŝuldas la plej bonajn ŝtofojn al la araboj: la superegan serion da ŝtofoj ankoraŭ ne bone konataj, kiu, komenciĝante je la X^a jarcento alvenas al la XVI^a, prezentante tipojn pri noveco kaj perfekteco eksterordinaraj inter ĉiuj ŝtofoj de Eŭropo. La glora tradicio enradikiĝis profunde. Kaj dum la jarcentoj de la Moderna Epoko, la drapoj de Segovia, la silkŝtofoj de Granada kaj Valencia, la veluroj kaj damaskoj de Toledo, la lintoloj de Galicia kaj de la Vaskaj Provincoj, la tapiŝoj de Alcaraz kaj de la Alpujarra (Alpuñarra), la murtapiŝoj kaj balkontapiŝoj de Salamanca, elmontras florantan hispanan industrion.

Rimarkindegaj estas la broditaĵoj kaj laboroj faritaj eltirante fadenojn por atingi kvadratajn aŭ rektangulajn truojn ĉe la toloj kaj poste aranĝante la truojn diversforme, brodite, k. t. p., laŭ kapablo kaj arto de la virinoj; la silkpuntoj kaj retaĵoj (linreto kies truojn ornamas per kudrolaboro kaj brodlaboro) de Almagro (Ciudad Real), la linpuntoj de Camariñas (Galicia) k. c., k. c. La nuntempe aranĝita ekspozicio, pli bone muzeo, pri la tipaj kostumoj de Hispanujo, kiu ju pli la tempo pasas, des pli riciĝas, vidigas nombregajn el tiuj laboritaĵoj.

LA VIVO

La hispana vivo estas seninterrompa serio da eksterordinare viglaj kaj variaj bildoj: la popolaj kutimoj estas konservataj en multaj lokoj de la diversaj regionoj, pro kio estas multenombraj kaj malsimilaj la edziĝaj, baptaĵaj kaj enterigaj ceremonioj; estas neeble kolekti receptare la tipajn manĝaĵojn, kaj malfacila laboro katalogi la festojn plej bril kolorajn. Estas necese travivi la hispanan vivon por koni el ĝi tion, kion ĝi havas ĉe siaj intimaj rondoj, kaj por ami ĝin. Restas por la vojaĝanto la eksteraĵo de l'amuzoj riĉaj je koloroj kaj sonoroj, kaj tio plej intima de la manĝaĵoj kopiataj la regionajn gustojn kaj karakterojn.

LA FESTOJ

La festoj estas speciala propraĵo de la karaktero, elmontrante tiujn de la gentoj, kaj ĉi tiu speciala propraĵo de ĉiu gento estas tio kio plej allogas kaj katenigas la fremdulojn.

La taŭr-ludoj estas la plej famigitaj festoj, kaj iamaniere la fremduloj pritraktis ilin prezentante nin de vidpunkto, kiu estas maljusta kaj kalumnia.

Estas la taŭrludoj spektaklo brilegega «sovaĝe belega». La unika el ĉiuj de l'nunaj tempoj, kiu konservas la grandiozon kaj la emociion de la ludoj ĉe la romanaj cirkoj. Partoprenas la taŭrludojn potence vidallogantaj elementoj—popolamasegoj, rapidmoveco, koloroj, lumo, brilo—kaj nombraj emociigaj valoroj—lukto, muskola forto, facilmoveco, lerteco, kuraĝo, aŭguroj pri morto—. Iafoje la morto mem subite aperas. Ĝia krueleco konstatata kaj tiel riproĉata ne estas pli granda ol tiu de aliaj popolaj ludoj de diversaj nacioj—bokso, kokluktadoj, kuradoj...—kaj kiujn oni ne povas senkulpigi kiel la taŭrludojn per ambiente ebriiganta el lumo kaj gajeco.

Legu, ekzemple, la eksterordinare belajn impresojn de Gautier.

Sed la hispanaj amuzajoj ne estas nur la taŭrludoj; estas aliaj multaj tute specialaj, apartaj tre impresigaj kaj eksterordinare pentrindaj. Same, kiel ĉiuj elmontroj de la hispana karaktero, la amuzajoj estas tre diversaj, kaj miksaĵo el religieco kaj malpieco estas ilia propra karakterizo. Ĉi tiu komplekseco grandiĝas iafaje per restaĵoj de malaperintaj kultoj, kaj per rememoroj pri rasoj kiuj loĝis ĉe ni je pasintaj epokoj.

En Galicia, la unuan kaj trian de majo, oni okazigas la festojn de l'*mayos* (majos); en aliaj lokoj de Hispanujo, tiun de la *mayas* (majas) kaj ĉi tiuj kaj tiuj estas restaĵoj de naturaj festoj honorantaj la triumfon de la printempo kaj la malkaŝon de la Santa Kruco. La 18^{an} de marto, antaŭtagon de S. Jozefo, oni bruligas en Valencia la tro ornamitajn vere artajn *fallas* (faljas); nokton de S. Johano oni festas per ceremonioj de tre antikvaj ritoj...; estas neeble fini citi festojn, sed oni devas nepre citi la batalojn inter maŭroj kaj kristanoj de la orienta parto de Hispanujo, la *mondas* de Talavera, la *marzas* de Celanova (Orense), la *romaxe* (romakse) al S. Andrés de Teixido, en Galicia, pilgrimadon kiun oni faros mortinte, se dum vivo oni ne ĝin faris, sed fariĝinte antaŭe danĝera besto aŭ vermo; la pilgrimadojn al ermitejoj aŭ specialaj lokoj, pilgrimadojn aŭ ekskursojn de Santander, Asturias kaj Galicia,

kiuj, kiam okazas ĉe la marbordo, kulminas per procesioj tra la maro.

Al ĉiuj tiuj ĉi festoj alkuras la popolamasoj ĉe la respektivaj regionoj montrante la tipajn kostumojn: de Muros kaj Bergantiños (Bergantínjos), en Galicia, de Candelario kaj Béjar (Beĥar), en Salamanca: de Lagartera, en Toledo, kaj la loĝantoj de Murcia, de Valencia, kaj la andaluzianoj, aragonanoj, k. c...

Alia granda ĉarmo de hispanaj festoj estas la dancoj, kiuj estas variaj: ĉu kolektivaj—la *sardana* (kies origino estas greka), en Cataluña: la *aurescu* (aŭresku), kiu estas devenanta de prahistoria epoko, en Navarra kaj Vaskaj Provincoj; la frumatena danco, en Asturias; la *muñeira* (munjeira), en Galicia; la *jota* (ĥota), en Murcia, Valencia, Aragón, k. c.—, ĉu pli personaj, kiel la andaluziaj dancoj, tre variaj, kun varieco eĉ ĉe kiu ajn danco, kaj nekonfuzebaj. Nur la *jota* (ĥota), la aragonan dancon alproprigis al si preskaŭ ĉiuj hispanaj regionoj, adaptante ĝin al siaj respektivaj propraj karakteroj.

Ne estas nacio iu ajn posedanta pli da diversaj kantoj ol Hispanujo: iuj, montrante orientalismon, similigas kantojn rusajn aŭ aziajn; aliaj plenaj je romantikeco kelta similigas muzikon de Irlando kaj Bretonio. La Muziko postulas nombrajn diversajn ludinstrumentojn: *gaita* (speciala fluto konsistanta el tubo tra kiu oni blovas por plenigi je aero felsakon, al tiu ĉi sako estas altenataj la fluto propre dirite kun dek truoj kaj kiun ludas la muzikisto fermante aŭ malfermante la truojn per la fingroj, kaj

basfluto konstante sonoranta samtone; la tubo, per kiu la ludisto plenblovas la sakon, havas klapon por malpermesi la eliron de l'aero tra ĉi tiu tubo mem kiam la ludisto ne blovas), tambureton, *zanfona* (speciala kordinstrumento, kiun oni ludas turnante cilindron, kiu, per kvazaŭ ungoj, vibrigas la kordojn), kay mancimbleton, en Galicia; *chisto* (ĉisto), kiu estas fluteto kun akra sonoro, kiun muzikisto ludas per unu mano, dum per la alia li ludas akorde tambureton, en la Vaskaj Provincoj; *dulzaina* (kvazaŭ klarneto), en Valencia; gitaron, en Andalucia; *bandurria* (kvazaŭ liuto kun ronda centra truo), en Aragón; kastanjetojn, mantamburetojn kaj aliajn nombrajn, kiuj satigus la kolektejon de kuriozema muzikamanto.

Ĉi tiuj elementoj de l'medio, muziko kaj kostumaro, donas nekonfuzeblan markon al la gajaj pilgrimadoj en Galicia kaj en Asturias, al la noktifestoj de Madrido en festotagoj de iuj Sanktuloj, al la foiroj de Andalucia kaj al la popolaj festoj de ĉiuj regionoj.

El ĉiuj festoj, malmultaj altiros la atenton de l'fremduloj pli ol la procesioj. Ne estas urbo en Hispanujo, eĉ malgranda aŭ malriĉa, kiu ne okazigas la Sanktan Semajnon per pli-malpli gravaj religiaj procesioj, kaj pli-malpli lukse ne festas sian Sanktan Patronon eĉ dum kelkaj tagoj per religiaj procesioj kaj ĉiaj festoj, prezentante per la religiaj procesioj altvalorajn artajn skulptaĵojn riĉe vestitajn kun

akompanantaro belvida. Krom ĉi tiuj ĝeneralaj procesioj, kiuj ankaŭ estas komunaj, estas en Hispanujo iuj specialaj procesioj riĉaj je historia, tradicia kaj prentrida intereso.

La procesioj de la Sankta Semajno havas eksterordinaran solenecon: en Sevilla, pro la luksaj religiaj asocioj sub aŭspicioj aŭ protekto de iu sanktulo, sanktulino, de Jesuo aŭ de la Sankta Virgulino, kaj pro la *saetas* (speciala kanto, kortuŝanta kanto, iafoje kantata ploro, kiu aŭdiĝas ofte dum la tuta irado de la procesio, elirante el la brusto—oni povas diri—de piulo aŭ de piulino, ĉu ĉe la strato mem, ĉu venante de trans ligna densa krado de fenestro aŭ balkono, forte sentiga kanto): en Valladolid, kie la *pasos* (tiel oni nomas la skulptaĵojn aŭ grupojn el religiaj skulptaĵoj) de la famaj skulptistoj Juan de Juni kaj Gregorio Fernández, portataj de procesianoj, iras tra la stratoj, revivigante per la elmontrado tutan gloran historion pri la hispana arto: en Murcia, kie la statuoj de Salcillo montras la lastajn kaj plej popularajn radiojn de niaj diverskolorigitaj plastikaĵoj... Vidigas kontraston la procesioj riĉegaj je arto kaj tiuj plenaj je emocio kaj fervoreco, kiel tiu nomata de l'*Caladiños* (Kaladinjoj), kiu, dum la nokto de l'Sankta Vendredo, trairas la galeriojn de la Katedralo de Santiago; kiel tiu de la Frataro de La Buena Muerte (La Bona Morto), kiu kun ĉerkoj, kranioj kaj kandelegoj, trairas la plej malnovajn stratojn de la grafa urbo, de Barcelona; kiel tiu de l'Rozario, dum la festoj de l'Pilar, en Zaragoza....

Tiu, kiu ŝatas la fabele riĉajn arĝentajojn de la renesanca periodo, alkuru al Toledo aŭ al Córdoba je la tago de l'*Corpus*, por ebriiĝi meze de nuboj el incenso, meze de floroj kaj de lumradiaro, antaŭ la hostiujoj kaj la pastraj vestaroj broditaj el oro, arĝento, perloj kaj ĉiaj riĉaj gemoj; kaj tiu, kiu deziras malantaŭeniri en la iradon de la tempo, vizitu Jaca (Ĥaka) je la tago de Sankta Orosia, je la 25^a de junio, por vidi la procesion de l'geendiabligit-oj, aŭ vizitu iujn vilaĝojn de Galicia dum la ĉefaj festoj, kaj timigos lian spiriton la malafabla aromo de la mezepokaj superstiĉoj.

Kaj laŭ forta kontrasto, oni vidos je l'*Corpus*, en Sevilla, kiel la *seises* (tiel oni nomas akolitajn, ĉar ili estas *ses—seis—*, kiuj kantas en la ĥorejo de la Katedralo) dancas antaŭ la Sankta Hostio—beleco kaj gracio—, kaj ĉe festaj pilgrimadoj en la Vaskaj Provincoj, en Santander kaj Galicia; kiel antaŭ la Virgulino aŭ Sanktuloj dancas la maristoj la balon de l'spadoj, kiu estas restaĵo de militaj ritoj de malaperintaj rasoj; aŭ se oni vojaĝas al Santiago de Compostela, oni rememoros la tempojn de l'pilgrimadoj, admirante la procesion de la relikvoj; kiu marŝadas tra la romanstilaj navoj je la takto de mezepokaj *chirimias* (*ĉirimias*, kvazaŭ klarnetoj), dum la *botafumeiro* (grandega pendanta incensilo) trairas la spacon fumigante la katedralon, tombon de l'Apostolo.

La detala priskribo de ĉiu el tiuj ĉi tipaj procesioj postulus nombrajn paĝojn; jen kian pentrindan ka-

rakteron havas la procesio de l'Rocío (de l'Roso), en Andalucía.

Tri-kvar tagojn antaŭ pentekosto eliras el Triana, Huelva, Almonte, Sanlúcar kaj el aliaj urboj eĉ dek-unu sekvantaroj konsistantaj el ĉaro ornamata kaj trenata de bovoj, sur kiu staras la standardo de la Frataro (religiasocio), kiun skortas rajdantaj membroj kaj post kiuj iras aliaj ĉaroj ornamataj sur kiuj vojiras la virinoj kun tipaj kostumoj same kiel la rajdantoj, kantante je la takto de kastanjetoj kaj mantamburetoj; tial ke la vojaĝo daŭras pli ol unu tagon, la sekvantaroj pasigas la haltojn ĉe l'kamparo sub la blua ĉielo stelumita. Kuniĝas ĉiuj sekvantaroj ĉe la marmarĉoj de l'Guadalquivir, kie staras la Ermitejo de l'Rocío (de l'Roso), kaj unu post la alia pasas, post la alveno, antaŭ la Virgulinon, kaj ĉevalojn kaj bovojn oni genufleksigas; dimanĉon de la Sankta Spirito, dum la nokto, okazas la procesio de l'Rozario, meze de la kamparo; lundon, okazas la procesio de la Virgulino, kiun portas ŝultren la loĝantoj de Almonte, ĉar ili havas privilegion por tio. Dum ĉi tiuj tagoj, konstante oni ludas, kantas kaj dancas *sevillanas* (seviljanoj), solan permesatan dancon; oni returneniras hejmen same solene. Diru ĉu restas io sama ĉe l'okcidenta mondo.

Ne procesio, sed tute singulara, specialega, religia festo estas «la mistero de Elche (Elĉe)», teatra sed religifervora prezentado, kiu kun muziko kaj versaĵoj antikvaj—laŭ maniero de liturgia faro— estas okazigata ĉiujare la antaŭtagon kaj tagon de

la Asunción (14^{na}-15^{an} de aŭgusto) en la preĝejo de
la Asunción en Elche (Alicante).

Ĝojo kaj tragedio; blindiganta lumo kaj ombroj
kaj nebuloj, orienta lukso kaj monaĥa sobreco, tio
funebra post tio volupta; tio kristana vestita de ido-
leco aŭ de natureco; tiaj estas la hispanaj festoj:
ĉiam *diverseco*.

LA MANĜAĴOJ

Ofte oni tro laŭdas la hispanan sobrecon; la novelo pritraktanta la vivon de l'friponoj, kaj ĝiaj malsataj kavaliroj, malriĉuloj, almozuloj kaj friponoj, ĉiam pretaj profiti okazon por manĝi ion, estas donintaj al Hispanujo tre malfavoran famon, kiun ne povas forigi la libroj pri manĝaĵoj de la *Arto Cíсорia* de Don Enrique de Villena, la poemo de *Gracia Dei*, de l'XV^a jarcento, ĝis la klasika libro de Martínez Montiño aŭ ĝis la modernegaj *Cocinero de Su Majestad* (*Kuiristo de Lia Reĝa Moŝto*), Angel Muro kaj *Picadillo* (Pikadiljo).

Apenaŭ ekzistas libro pri vojaĝoj tra Hispanujo, kiu ne rimarkigas tuj la surprizon de l'verkisto pro la manĝaĵoj; ĝenerale, se la vojaĝanto estas franca, ĉi tiu trovas ilin nedelikataj, sed ĉiuj koincidas pri ilia bongusto.

Oni povas konstati, ke niaj manĝaĵoj estas fundamentaj, ne enkalkulante trompaĵojn; ili, do, konsistas el ĉefkvalitaj elementoj serioze kombinataj.

La kombinaĵoj devenas de malnovegaj praktikoj;

la antikveco perfektigis bonege ilian spicadon kaj ĝustgustumon.

La nacia manĝaĵo estas la *cocido* (*kosido* proksimume), kiu estas tiel varia kiel diversaj estas la regionoj almenaŭ, sed ĉiam kaj ĉie tiu ĉi manĝaĵo estas kuiritajo el bovina, ŝafa kaj porka viando kun aliaj aĵoj. La *madrida* entenas sufiĉajn garbanzojn (kikerojn) terpomojn, brasikon—dum somero kun salato—kaj bovinaĵon, kolbason kaj lardon, iafoje ankaŭ kokviandon kaj ŝinkon, kaj ĉion kolorigas flave la safrano. La *aragona* aldonas frititajn pimentojn; la *andaluzia*, la *majado'n* (*moĥado'n*, *pistitaĵon*) kaj fruktojn, precipe pirojn kaj cidonion. Tiu de la malvona Castilla (Kastilujo) entenas krome sekigitan ŝafviandon aŭ kaproviandon kaj *bola'n* (miksaĵon el pistitaj viando, ovaĵo, lardo kaj paneroj). Poste venas la plej gravaj variaĵoj, tiel gravaj, ke ili perdas la diritan nomon, akirante aliajn: *olla* (*olja*) *podrida*—*poderosa* (potenca)—, en la montaro de Santander, kaj kiu estas vere sumo el regionaj produktitaĵoj, el bovinaĵo, ŝinko, *morcilla* (*morcilja*, kiu estas speciala kolbaso el porka sango kun bulbo, kun iaj spicoj, iafoje kun rizo), kolbaso, kokviando, terpomoj, brasikoj, kaj aliaj manĝeblaj plantoj; *pote*, en Asturias, kaj *caldo*, en Galicia: tiu de Asturias kun ŝinko, porkorelo, kolbaso, *morcilla* (ĉi tiu varias iomete, kaŭ la regionoj, sed la ĉefaĵo estas la sango de porko eĉ de ŝafo, bovo aŭ kapro), terpomoj, fazeoloj kaj brasiko; tiu de Galicia, malpli densa,

kun brasiko, junaj napfolioj, napoj aŭ plej dikaj trunketoj de plenkreskaj napplantoj kun graso, kukurbo, fazeoloj, terpomoj kaj ĉiaj porkaĵoj, kiujn oni volas aldoni.

Ĉiu el la preparolitaj elementoj devas esti de speciala loko por ke ĝi estu plej bongusta; tiel, la ŝinko devas esti de Avilés, Villalba, Trevelez, Jabugo (Ĥabugo) aŭ de Montanchez; la kolbasoj (el porka karno, porka lumbaĵo, sed ankaŭ miksaĵo kun la porka karno bovinan, ŝafan eĉ kapran), de Cantimpalos, Candelario aŭ de la Ríoja (Rioĥa); la terpomoj, de Monforte aŭ de Ariza; la fazeoloj, de l'Barco de Avila; la garbanzoj, de Fuente-Sauco; la *grellos* (trunketoj de l'folioj de plenkreska napoplanto), de Santiago; la napoj, de Lugo; la pimentoj, de Calahorra...

Longan priskribon bezonus la diversspecaj kolbasoj: la *butifarra* kataluna; la *sobreasada* de Mallorca; la *chorizo* de Pamplona; la *salchichón* (salĉiĉon) de Vich; la *embuchado* de Extremadura; la *morcilla* de Galicia; la *longaniza* de diversaj regionoj, kiu varias laŭ la lokoj. La *chorizo* (ĉorizo), kiu same varias, rimarkinde kaj troe mirigas kaj ŝatigas la fremdulojn; rememoru la impresojn de Barrow kaj de Amicis.

Oni bezonus iujn paĝojn por nur enlistigi la aliajn tipajn manĝaĵojn, super ĉio tiujn de la nordaj landopartoj en kiu loĝas plej gastronomaj gentoj: en la Vaskaj Provincoj estas rimarkindaj la *bacalao a la*

vizcaina (gado laŭ vaska kuirmaniero), la *pizpiri* kaj la angilidetoj, kiuj postulas por esti bongustegaj gliti el la forko kiam oni prenas ilin de sur la telero; en Santander, la *bonito asado* (rostita tino aŭ tonfiŝo) kaj la *besugo* (*gros-yeux, sea bream, latine bisculus, do, biskuloso*) (?); en Asturias, la *fabada* (kuiritaĵo el faboj, ĝenerale el fazeoloj, kun porkaĵoj, k. c.); en Galicia, la *caldereira marinera*, kiun oni spicas per mara akvo; la polpo sekigita, kiun oni vendas en la foiroj; la *lacón* (lakon, t. e., la ŝinko el antaŭaj kruroj de la porko) kun *grelas*, kiu estas nepra manĝaĵo dum la karnavalo, kaj *empanadas* (bakita farunaĵo entenanta lojtojn, angilon, sardin-ojn, lumbaĵon de porko, kokviandon..., kaj kiuj devenas de tre malnova epoko, ĉar ili estas reprezentataj samforme laŭ plektitaĵo ĉe la skulptita reĝa festeno sur la elstarantaj ŝtonoj kvazaŭ imoŝtoj de l'epikospa palaco de Santiago, de la XIII^a jarcento. En Kastilla, la porkido kaj ŝafido rostitaj. Se ni iras en la Sudon, en la marbordon, ankaŭ estas rimarpindaj la frititaj fiŝoj de Cádiz, Sevilla, k. c.; la *bocas de la Isla* (Insulo), grandaj preniloj de la kraboj; la *boquerones* (*bokerones, anĉovoj*) de Málaga, kaj dum la somero, la *gazpacho* kaj *ajo-blanco* (*año-blanko*), la unua estas malvarmeta supo el kruda ajlo pistita kun paneroj, akvo, olivoleo kaj preciza salo, la dua enhavas pliajn aĵojn: vinagron, bulbon kaj iafoje tomaton, kaj estas pli densa ol la unua, kaj ĉe la tuta Andalucia la *potaje* (*potálie*), kiu estas kuiritaĵo el legomoj. Ĉe la orienta parto de Hispa-

nujo estas rimarkindega la *paella valenciana* (*paella* de Valencia), kies ĉefa elemento estas la rizo, kaj ĉi tiun akompanas laŭ plaĉo diversaj viandoj (porka, koka, k. c.) fiŝoj kaj ruĝaj pimentoj, kaj el tio rezultas bongustega kaj bonodora manĝaĵo, kiel aliaj hispanaj manĝaĵoj, sed ĝi ankaŭ belaspektas pro siaj koloroj pli ol iu ajn alia.

Longega estus kaj devus esti la paragrafo pri la vinoj, unu el plej grandaj riĉaĵoj kaj bonajoj de Hispanujo. Same kiel ĉiuj hispanaj produktitaĵoj kaj elmontraĵoj estas mirigante variaj la vinoj: ĉiuj konas la vinoj de Jerez kaj de Málaga—kiujn la poetoj alnomis *fluida suno*—; tiuj de la *Rioja Alta* kaj *Baja* (Rioĥa norda kaj suda) aŭ de Alava kaj de Haro, estas ravaj por la komuna manĝado; tiuj de Aragón kaj de l’Kataluna *Priorato*, fortaj malklaraj, densaj; tiu de Toro, densa; tiu de Valdepeñas (Valdepenjas), klara; tiu de *Yepes* (Jepes), rubenkolora kaj adstringa; tiuj de Galicia malmulte alkoholaj kaj tre bonodoraj kaj iafaje gasaj. Estas, plie, vinoj apenaŭ enhavantaj alkoholon, kiel tiu de Asturias kaj la vaska *chacoli* (*ĉakoli*). Apud la vinoj diritaj estas aliaj specialaj trinkaĵoj, kiel la *tostado gallego*, kiun oni elĉerpas el vinberoj preskaŭ sekaj; la anizlikvoroj de Asturias, la Montaña haj Mallorca; la brandoj de Cazalla de la Sierra kaj de Chinchón. Oni devas citi la *sidra*’n (pomvinon) de Asturias, kiun oni elĉerpas el bonodoraj pomoj.

Pri la fromaĝoj, oni devas same rimarkigi ilian grandegan variaĵon: la *tetilla gallega*, mola kaj butereca; tiu de Cabrales, fermentita kaj jukgusta; tiu de Burgos, preskaŭ nur laktosuraĵo aŭ laktokremo; la forta de la Mancha, aŭ *manchego*, kiun oni premas kaj modeligas per longaj kaj mallarĝetaj plektitaĵoj el sparto metitaj laŭ ringoj, kiun oni konservas ĉe ujoj da olivoleo, kaj kiu postulas por esti manĝata trinkadi ruĝan vinon; tiuj freŝaj de Santander; tiuj de Avila, Cuenca kaj Villalón; tiuj de Asturias, kiujn oni nomas fromaĝoj de San Simón, kiujn oni metas dum kelke da tempo sub influado de l'fumo por bongustigi ilin: ne estas regiono sen speciala fromaĝo; ĉiuj atendas la propagandon, kiu famigos ilin same, kiel okazas al plej famaj de la cetero de Eŭropo.

Bongustega estas la mielo de la Alcarria (Guadalajara) kaj tiu de Cuenca kaj ĝia montaro, kiuj odoras rosmarene, timiane, majorane; tiu de Valencia, kun aromo de l'oranĝfloro.

Abundege varia estas la konfitajaro per kiu oni povus verki veran geografion de Hispanujo: apenaŭ estas monaĥinejo sen speciala frandaĵo—*yemas de San Leandro*, en Sevilla; de S.^a Teresa, en Avila; *limoncillo* (citrono), *nuez* (nukso), *cabello de angel* (haroj de anĝelo, el la karno de kukurbo kvazaŭ fadenigita) kaj *naranja* (oranĝo), de la monaĥinoj Claras, en Redondela—. Krom la desertoj komunaj aŭ vulgaraĵ en la tuta Hispanujo—*arroz con leche* (rizo kuirita kun lakto kaj sukero), *natillas* (el lak-

to, ovoflavajoj kaj sukero), *torrijas* (el pano trempita de lakto kaj de ovo agitita poste, kaj fine fritita kaj metita ĉe plado da siropo, ĉu da vino de Jerez, ĉu da alia simila vino), *leche frita* (lakto fritita, farunaĵo kun lakto suffice densa kaj sukerigita, kiun poste oni fritas), k. c.—; oni nepre devas citi, ĉar estas tre indaj je mencio, la *turrões* de Jijona, Cádiz kaj Zaragoza, la *mazapanes* de Toledo (marcipanojn), ĉi tiuj kaj tiuj estas konfitaĵoj el migdalo, dolĉigitaj fruktoj; sukero, ovaĵo, k. c.; la *rosquillas* de Fuenlabrada, Yepes kaj Silleda; *pestiños* kaj *bartolillos*, de Madrid; la *alfajores* de Medina-Sidonia; la *alaju* de Granada; la *mantecados* de Estepa kaj Antequera; la *mantecadas* de Astorga; la *bizcochos* (biskvitojn), de Calatayud kaj Monforte; la *borrachos* de Guadalajara (biskvitojn trempitajn de Jereza vino kaj siropo); la *boleardos* de Tuj; la *almendras* (migdalojn), de Alcalá; la ensiropigitaĵojn de la Rioja kaj Puente Genil; la *arrope manchego*, kiu estas el kukurbo aŭ melono kuirita kun nefermentata vino kaj iom da kalko. Kaj parolante pri Portugalujo: la *petiscos* estas tro variaj; *queixadas* de Sintra; *rebandas* de Thomar; *glorias*, *ovos moles*, de Aveiro...

Ne forgesu la tro variajn kaj abundajn fruktojn: fragon de Aranĵuez kaj de Valencia; ĉerizojn kaj pirojn de Avila; oranĝojn de Murcia kaj Valencia; vinberojn de Málaga, Jerez, Almería kaj la Mancha; abrikotojn de Toledo; persikojn de Campiel kaj de Lérida; akvomelonojn de Talavera kaj de Cambados; melon-

ojn de Villaconejos; pomojn de Asturias; figojn de Fraga; granatojn kaj hindajn figojn de Granada; migdalojn de Córdoba; olivojn de Sevilla... Estas kompreneble, ke la fruktoabundeco naskis kaj disvolvas gravan industrion por prezenti aŭ liveri la fruktojn ĉu konservitajn ĉe siropo ĉu laŭ marmeladoj.

Jam diris la Saĝa Reĝo:

«HISPANUJO ESTAS SAME KIEL PARADIZO DE DIO.»

NUNTEMPECO

La antaŭaj paragrafoj estas kvazaŭ invito al vojaĝo tra Hispanujo; sed estas io nepre aldonebla, kaj tio estas la jeno:

Hispanujo ne estas nur lando de arto kaj gloraj pasintaĵoj, kiel Grekujo, Eĝiptujo aŭ Palestino; ĝi estas lando forte vivanta laŭ plena aktiveco.

Same, kiel ŝatanto de la beleco kaj malnovaĵoj devas preferi pli Hispanujon ol aliajn landojn, negocisto kaj studanto de aktualaĵoj trovos tie ĉi instruojn kaj celojn por sia energio.

La necerteco, per kiu finiĝis por Hispanujo la XIX^a jarcento, ne tiris la landon al senespero, male ĝi estis instigilo al agado. La terkultura, industria kaj komerca renaskiĝo estis tiel intensa, ke, kiam la granda milito eksplodis, oni povis provizi la landon el ĉio, kaj kvankam la deviga izoleco okazigis malfacilaĵojn, ĝi ne alportis senhavecon.

La postmilita krizo solviĝas pli facile ĉe ni ol ĉe preskaŭ ceteraj nacioj, malgraŭ la konstanta sangelverŝado kaj elspezado pro la milito en Maroko, kie ni daŭrigas nian historion malŝparante forton

kaj penadon por malfermi al civilizita mondo neniam trairitajn vojojn.

La renaskiĝo de Hispanujo estas evidenta. Nombraj urboj kreskas mirigante. La havenoj pli kaj pli intensigas la komercmovadon. La minejojn oni ekspluatas per la plej efikiga tekniko: Altos Hornos de Bilbao kaj de Sagunto (Grandaj Fandejoj), *Peñarroya*, *Río Tinto*, karbejoj de *Asturias*... La konstruado de ŝipoj sukcesas ĉe la tuta Nordo. La terkulturo atingis grandan progreson per uzado de plej deca ilaro kaj per enkonduko de novaj terkulturoj koncernantaj iujn novajn fruktojn kiel tiun de la sukerbeto, Renaskiĝas la artaj industrioj kun renovigantaj aspiroj sur la tradiciaj bazoj. Ju pli pasas la jaroj des pli pligrandiĝas la eksportado: niaj olivoleoj trafas la plej bonajn vendkampojn, kaj niaj fruktoj disiĝas tra la tuta mondo.

Se jam oni atingis multe kaj tio ĉi okazigis la malpliilongigon de la distanco apartiganta nin de la aliaj nacioj—ne nur pro la dekadenco de la popoloj frapitaj de la milito, sed ankaŭ pro nia progresiganta kuraĝo—, multe pli nia lando estas progresonta dum mallonga tempodaŭro.

Por la hispana studanta kaj laboranta popolo, «ĝojo kaj laboro» estas lia devizo. La pesimismo, kiu nestas ĉe iaj elektitaj spiritoj, ne devenas de la vidaĵo prezentanta la landon falinta, sed de la konscio ne esti vidanta Hispanujon pli alten ol estas dezirata de ili.


Restas for de Hispanujo bildoj pri *ia Hispanujo*

vere neniam ekzistanta, kiujn okazigis la efektiva malprogreso de la XIX^a jarcento. Ju pli la tempo pasas, des pli la bildoj malaperas, kaj la konscio pri Hispanujo fariĝas pli ĝusta kaj justa, malpli fipen-trinda.

Jam la vojaĝon tra Hispanujo oni ne povas rakonti laŭ faris Ford, Dumas aŭ Gauthier; la hispanaj va-gonaroj estas tiel bonaj kiel la fremdaj plej bonaj de Eŭropo, kaj se la fervoja reto ne estas tre vasta, abundas eksterordinare linioj de aŭtomobiloj. La aŭtomobilservo por turismo, eĉ en malgrandaj urboj estas modelo pri malkareco kaj organizo.

La problemoj pri gastigo estas solvata de antaŭ kelkaj jaroj tiel bone en la grandaj urboj kiel en Ita-lujo, kaj en la plej humilaj urboj oni trovas bonajn gastejojn, kie la mankoj pri komforteco estas kom-pensataj, por mallongedaŭra restado, de pureco ka bongustaj enlandaj manĝaĵoj.

La diverseco de nia teritorio, de la pejzaĝo, la senfina varieco de fundamentoj por fari vojaĝon tra Hispanujo malfaciligas konsili difinitajn vojaĝplan-ojn. La vojaĝanto devos elekti urbojn kiel centrojn el kie ekskursi tien kaj tien. Fiksi la urbojn plej bonajn, kiuj povas esti plej bonaj centroj estus certe fali en kapricajn preferojn; sed nur kiel simplan montron oni povas konsili, ke bona vojaĝplano ŝato-ta kaj profitdona povus enteni, kiel urbo-centrojn, la ĉefurbojn de la diversaj regionoj.



SPECIMENO NEVENDEBLA
SEN PAGE DISDONATA DE LA
REGA DELEGITO PRI TURISMO
KAJ ARTA KULTURO N.º

AL